

ESPERANTO

JULIO/AŬG. 1962

55a Jaro - N-ro 680 (7-8)

esperanto

REVUO INTERNACIA

JULIO-AŬG. 1962

55a JARO

N-RO 680 - (7-8)

Fondinto : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clackmannanshire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 32788. Ĝirkonto: 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ** la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :
R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1962) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :
1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :
0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en pli ol 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado
77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :
La Hungara Ministro de Trafiko kaj Poŝto Stefano KOSSA, mem esperantisto, faras la festparoladon ĉe la malfermo de la 14a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso en Budapest (vd. paĝon 133).

Enhavo

Falsaĵoj, antaŭjuĝoj, ignorado, blufoj . 121
Kulturi virgan kampon 123
Lumo kaj obskuro 124
Tro malmulte da nederlandaj interpretistoj en eŭropo 125
Vizito al greka printempo 126
Ni estis en la Esperanto-golfo Primoŝten 127
La Esperanto-movado kaj neŭtraleco . 128
La kokinejo 129
Prof. Lapenna en Nederlando 130
14a Internacia Fervojista Esperanto Kongreso 133
Memoremo 136
Pri radiodisaŭdigoj 136
Tabela trarigardo pri la informa laboro en 1961 138
Rimarkoj pri la informado en 1961 . . . 139

Rubrikoj
Ŝaka rubriko 131
Novaj libroj 134
CED 135
La Juna Vivo 137
Nia Forumo 140
Tra la mondo 140
Oficiala informilo 142
Esperantista vivo & Nekrologo . . . 142
Radio 144

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa marĝeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

FALSAĴOJ, ANTAŬJUĜOJ IGNORADO, BLUFOJ . . .

En la arĥivo de CED troviĝas, interalie, dosiero kun la titolo "Misprezentoj". Ĝi ne estas en unu el la ŝrankoj, sed sur bretaro, ĉemane: ĉiutage io eniras en ĝin. Temas pri gazetaj eltranĉaĵoj, broŝuroj, libroj en kiuj la lingva problemo estas deformita aŭ la Internacia Lingvo misprezentita ĉu pro nescio kaj ignorado de la plej elementaj faktoj, ĉu intence por trompi la publikon kun la evidenta celo malebligi la pluan disvastiĝon de Esperanto kaj detrui ĝiajn ĝisnunajn atingojn.

Paralele kun la rapida akriĝado de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj kaj kun la novaj rimarkindaj sukcesoj de Esperanto en la lasta tempo, ĉiam pli aŭdiĝas seriozaj pledoj por la Internacia Lingvo kiel la sola ebla solvo en la kreskanta ĥaoso, sed ankaŭ grandiĝas la kontraŭstaro de difinitaj medioj kaj multiĝas la atakoj. La afero en ĉiu okazo estas en la tagordo kiel unu el la mondproblemoj de la hodiaŭo. Parte tion montras ankaŭ la imponaj ciferoj en la statistiko pri informado por la jaro 1961, kiu aperas en alia loko de tiu ĉi numero. Vole-nevole, eĉ la plej histeriaj kontraŭuloj, ne parolante pri la bonintencaj ignorantoj, ne plu povas pretervidi tiun fakton, kiu nomiĝas Esperanto. Alia afero estas, ke pri ĝiaj diversaj aspektoj — de la lingva strukturo ĝis la rolo kaj celoj — oni skribis kaj diris tiom da fantaziaj malĝustaĵoj, ke, kun la escepto de la nomo "Esperanto", restas nenio aŭ apenaŭ io el la lingvo, kiel ĝi prezentiĝas en la realo.

Falsaĵoj sub Masko de Scienceco

Tipa ekzemplo estas la verketo *"Les Langues Internationales"* (La Internaciaj Lingvoj) de Pierre Burney, universitata agregaciulo kaj Profesoro en la Franca Instituto. La 126-paĝa libro estas eldonita de la fama *Presses Universitaires* de *France* kiel numero 968 en la populara serio "Que Sais-je ?" (Kion mi Scias), tre kredeble en pluraj miloj da ekzempleroj. La verko celas prezenti la lingvan "babelismon", la solvojn de la pasinteco, la nunan dinamismon de la grandaj naciaj lingvoj (sub la erariga titolo "la grandaj internaciaj naturaj lingvoj"), la Internacian Lingvon Esperanto kaj diversajn projektojn de komuna lingvo (sub la duoble erariga titolo "la artefaritaj internaciaj lingvoj") kaj la eblan solvon de unu sola lingvo por la tuta mondo.

Kvankam en la libro troviĝas multaj korektaj informoj kaj plurloke la argumentado estas kontentiga, tamen en ĉiuj partoj troviĝas ankaŭ eraroj kaj strangaj asertoj. En tiu ĉi kunteksto ili ne interesas nin. En la parto pri Esperanto kaj pri kelkaj lingvo-projektoj svarmas principaj eraroj kaj malĝustaĵoj rilate la faktojn. Estas principa eraro paroli pri "artefaritaj lingvoj", ĉar, unue, la lingvoj ne estas piroj, kiuj kreskas nature sur arboj, sed estas produktoj de la homa socio kaj sekve estas nescience nomi ilin "naturaj" aŭ "artefaritaj", kaj, due, estas pli ol primitive ne distingi inter Esperanto kiel vivanta lingvo, unuflanke, kaj la sennombraj projektoj, aliflanke. Profesoro Burney skribis la ĉapitron pri Esperanto ne nur sen scio de la lingvo, sed ankaŭ sen scio pri bazaj faktoj rilate ĝin. Li eĉ ne havigis al si bonan vortaron. Persono, kiu povas aserti, ke la nombro de vortradikoj en Esperanto estas ĉ. 2.650, evidente neniam vidis modernan Esperantan vortaron. Efektive, nur la Plena Vortaro entenas ĉ. 8.000 vortradikojn, el kiuj oni povas formi almenaŭ 100.000 vortojn. La aŭtoro skribas eĉ ne unu vorton pri la 120 teknikaj kaj fakaj vortaroj de Esperanto, kiuj enhavas milojn de specialaj terminoj. Parolante pri la kunmetitaj vortoj en Esperanto, la aŭtoro, interalie, donas jenajn ekzemplojn : tempego, jarcentaro, pliularo (!!!), kiujn efektive neniu Esperantisto uzas. Li asertas, ke, ekzemple, "pliularo" signifas en Esperanto "plimulto" ! Li ne scias, ke en Esperanto ekzistas la vorto "filio". Li same tiel ne scias, ke en ĉiu moderna vortaro troviĝas la vortoj "hospitalo" kaj "radaro" kaj sekve li riproĉas, ke tiuj vortoj — ne ekzistas en Esperanto. Kvankam li mencias — verŝajne por montri sin bone informita — la verkon "Plena Gramatiko de Esperanto" de Kalocsay kaj Waringhien, tamen tutcerte li ne tralegis ĝin kaj ankaŭ ne povis ĝin tralegi pro sia ignorado de Esperanto (verŝajne eĉ neniam vidis ĝin), ĉar alie li ne povus diri tiom da malĝustaĵoj rilate la sistemon de afiksoj en la Internacia Lingvo. Evidente la dokta profesoro pri lingvoscienco ĉerpis siajn informojn el pseŭdosciencaj broŝuretoj aŭ pamfletoj kontraŭ Esperanto. Li citas la hontindan raporton de G. de Reynold al la misfama "Intelektula Komisiono" de la mortinta Ligo de Nacioj — raporto, kiu celis doni malbonan atestilon al Esperanto, sed efektive fariĝis precize tia por la aŭtoro — sed prisilentas la raporton Nitobe, kiun akceptis la Tria Asembleo de la Ligo de Nacioj, kiel ankaŭ la rezolucion de UNESKO de 1954 ! Prof. Burney verŝajne ne scias, ke G. de Reynold estis same tia ignoranto pri Esperanto, kiel li mem. Kaj tiamaniere al unu kompleta ignorado

nur aldoniĝas nova kompleta ignorado. La aŭtoro kritikas ankaŭ la akordiĝon de la adjektivo kun la substantivo, kaj la akuzativon. Kvankam lingvisto, li ne komprenas la avantaĝojn, kiujn ĝuste tiuj formoj donas al la Internacia Lingvo : plian precizecon kaj grandan elastecon en la formado de la frazo.

Konklude, restante fidela al sia modelo Reynold, li ripetas liajn vortojn : "Oni povas traduki ĉion en Esperanton, oni ne povas ion ajn esprimi". Kia profunda saĝo ! Precipe kiam ĝin eldiras tiel fama lingvisto ! Kvazaŭ estus eblaj tradukoj de kiu ajn lingvo al kiu ajn lingvo nur de vortoj, sen la enhavo. Mi tre esperas, ke troviĝos iu franca esperantisto, kiu tradukos al mia eminenta lingvista kolego tiujn ĉi kelkajn liniojn, por ke li mem konstatu, ke en la Internacia Lingvo oni povas esprimi ne nur "nociojn administrajn kaj jurajn", pri kio li grandanime konsentas, sed ankaŭ ĉion alian, inkluzive sentojn, ekzemple profundan indignon pro tiuj falsaĵoj sub la masko de scienceco, se la vorto "scienceco" estas entute tradukebla en la francan.

Blufoj kaj Antaŭjuĝoj

En la traktata verketo ne mankas ordinaraj blufoj. Parolante pri konata projekto de komuna lingvo, kies pugneto da protagonistoj faras grandan bruon asertante, ke ĝi estas "tuj kompreneblа", la aŭtoro konsentas pri tiu punkto, kvankam, aliflanke, li korekte trovas plurajn mankojn en tiu projekto. Li asertas, ke pro tio la projekto "proksimiĝas ĝis maksimumo al la vivo". Al kiu vivo, mi dezirus scii. Ĉu al la vivo de milionaj amasoj da Ĉinoj, Japanoj, Rusoj, kaj aliaj popoloj, aŭ al la vivo de grupeto da okcidenteŭropaj intelektuloj, kiuj parolas kelkajn okcidenteŭropajn lingvojn ? Mi mem montris tekstojn en tiu projekto al kleraj personoj parolantaj nur la anglan kaj — neniu komprenis. S-ro A. Woodburn, brita parlamentano, kiu antaŭ nelonge prezentis al la Brita Parlamento leĝproponon por kreo de "Eŭropa Lingvo" kaj kiu tiuokaze ricevis, kompreneble, diversajn propagandilojn ankaŭ pri tiu projekto, diris al mi en konversacio, ke li volis elprovi tiun t.n. "tujan kompreneblecon". Li montris la tekston — ĉiam temas pri la samaj, ruze elektitaj tekstoj — al siaj kolegoj en la Parlamento kaj la rezulto estis precize la sama : neniu komprenis. Por s-ro A. Woodburn, kiu ne estas lingvisto-profesoro, tio plene sufiĉis por konstati la blufon. Sed nia lingvisto-profesoro venas eĉ ne al ideo fari tian eksperimenton. Li nur papage ripetas tion, kion oni ruze servas al li. Kaj tamen, se al nekompetentaj naivuloj oni povas pardoni tiajn glitfalojn, tutcerte oni ne rajtas ekskuzi specialiston pri lingvoj, kiam li same naive kredas al blufo kaj per sia aŭtoritata titolo firmigas ĝin. Ĉiu, kiu iom okupiĝis pri la afero, scias bone, ke ĉie en la mondo oni ŝvite lernas dum multaj jaroj siajn proprajn naciajn literaturajn lingvojn por povi kontentige mastri ilin. Kiom da jaroj Prof. Burney mem devis lerni la francan por povi, se ne majstri ĝin, do almenaŭ korekte uzi ĝin skribe kaj parole ? Kaj ĉu iu iam ajn en lia lando venis al ideo starigi la saman tezon por la franca lingvo ? La celo de tiu tuta blufo rilate la t.n. "tujan kompreneblecon" estas kredigi al primitivuloj kaj maldiligentuloj, ke, jen, ekzistas lingvo kiun ili povas kompreni sen lernado. Kvazaŭ, eĉ se tio estus ebla, tio solvus la problemon en mondaj kadroj. Kvazaŭ lingvo estus ne instrumento de reciproka komunikado, sed nur de pasiva akceptado de la pensoj de aliaj ! Kaj nun, akceptante por momento tiun maleblan supozon kiel ĝustan, ni imagu per la lastaj fortostreĉoj de nia fantazio internacian kongreson, dum kiu neniu povas paroli, sed ĉiuj povas kompreni. Kia spektaklo : regas profunda silento kaj ĉiuj perfekte interkompreniĝas !

Da tiaj stultaĵoj jam vere sufiĉas. Sur la hodiaŭa ŝtupo de sia evoluo la homaro — la tuta homaro kaj ne nur Eŭropo aŭ tio, kion oni kutimas nomi "Okcidento" — urĝe bezonas plensangan, vivantan, ĝis maksimumo perfektan lingvon, kaj ne ian palan surogaton. Kompreneble, por povi ĝin plene regi kaj libere uzi aktive kaj pasive, necesas ĝin lerni, ellerni kaj daŭre perfektigadi la akiritan scion. Neniam iu ajn respondeca esperantisto asertis, ke Esperanton oni povas scii sen lernado. Tiajn idiotaĵojn ni lasas al aliaj. Sed ni asertis kaj plue asertas, ke tiun ĉi admirindan lingvon oni povas ellerni per iom da bona volo multoble pli facile ol kiun ajn fremdan nacian lingvon kaj eĉ konsiderinde pli rapide ol sian propran literaturan nacian lingvon. Anstataŭ meti en la saman keston tiun vivantan kaj socie enradikiĝintan lingvon kun diversaj mortnaskitaj projektoj kaj projektetoj, lingvistoj de la tipo de Prof. Burney agus multe pli science, se ili objektive konstatus la faktojn kaj formus siajn juĝojn surbaze de ili. Antaŭkondiĉo de scienca laboro en kiu ajn branĉo estas koni kaj rekoni koncernan realaĵon.

La Maljuna Harry kaj la Supozeble Juna Ernest

Estus eble diri ankoraŭ multon pri diversaj antaŭjuĝoj, mankoj de scio, ofte malicoj, kelkfoje neintencaj eraroj. La dosiero pri misprezentoj ja estas sufiĉe dika. En ĝi troviĝas ne nur nomoj de kelkaj lingvistoj, sed ankaŭ de politikistoj kaj aliaj publikaj agantoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj, ĉefe egoisme naciismaj aŭ profesiaj, kontraŭstaras la ideon mem de supernacia, neŭtrala komuna lingvo kaj sekve, tute nature, direktas la pinton de siaj atakoj al la sola serioza kandidato por tiu funkcio : la Internacia Lingvo Esperanto. Se nenio alia, ĝuste la akreco de tiu rezistado al la venka marŝado antaŭen de la Internacia Lingvo, montras la kreskantan socian gravecon, kiun ĝi akiras de jaro al jaro.

En tiu tuta bolado okazas, de la alia flanko, giganta lukto por konservo de la pozicioj aŭ por akiro de novaj pozicioj de la naciaj lingvoj. Milionajn sumojn oni elspezas por la disvastigo precipe de la t.n. "grandaj" lingvoj, sed ankaŭ la "malgrandaj" ne plu estas neglektataj. Ĉiu laŭdas la kvalitojn de sia respektiva lingvo kaj de tiu aŭ alia "granda lingvo". Interalie, oni publikigas astronomiajn ciferojn pri la nombro de personoj, kiuj parolas tiun aŭ alian lingvon, sed oni kutimas forgesi la dialektajn kaj aliajn diferencojn, la prononcajn kaj ortografiajn malfacilaĵojn, kiuj kaŭzas, ke efektive sub la sama nomo kaŝiĝas multaj malsamaĵoj. Kelkfoje ili kaŭzas verajn tragediojn. Jen nur unu el la lastaj ekzemploj :

Maljuna Harry Speight — raportas *Daily Mail* de la 26-a de majo—estis Jorkŝirano, el tiu bela regiono en kiu okazis la Universala Kongreso en la pasinta jaro. Kiam li pensiiĝis, li ekloĝis en la sudo de Anglujo, en Kent, sed en la butikoj oni ne komprenis pri kio li petis : li parolis en la jorkŝira dialekto kaj kun jorkŝira akcento. Li deziris aliĝi al klubo de maljunuloj, sed ankaŭ tie li estis nekomprenata. Kaj tiel same okazis ĉie ĉirkaŭ li. Li sentis tion tiel profunde, ke fine li mortigis sin mem.

Sed alia gazeto — *Daily Herald* de la 28-a aprilo — publikigis leteron de iu Ernest E. Bearman. Li skribis, ke li komencis lerni Esperanton nur antaŭ 6 monatoj kaj li daŭrigis : "Nun, post lernado de la lingvo nur 3 horojn ĉiusemajne, mi povas korespondi kun personoj en Danlando, Italujo, Francujo kaj Jugoslavio".

Kvankam la kazoj de la kompatinda maljuna Harry kaj de la supozeble juna Ernest ne estas tipaj, ili tutcerte estas instruaj. Profesoro Burney kaj similaj povus iom lerni el la tragedio de Harry Speight kaj ili devus imiti se ne la ekzemplojn de konataj lingvistoj-esperantistoj Prof. W. E. Collinson, Prof. Björn Collinder, Prof. E. A. Bokarev, Prof. G. Waringhien kaj aliaj, do almenaŭ tiun de Ernest Bearman antaŭ ol skribi unu solan plian vorton pri Esperanto.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Ota Ginz

KULTURI VIRGAN KAMPON

Informante pri Esperanto, vi ofte spertas, ke griza estas ĉiu teorio. Facile vi venas en situacion, por kiu ne ekzistas strikta kaj klara vojmontrilo kaj vi devas vin adapti al la cirkonstancoj. Plej bone preparitaj argumentoj, kies celtrafo al vi ŝajnis senduba, montriĝas neefikaj. Ne ĉiam estas kulpaj la konvinkotoj.

La altaj publikaj instancoj en Israelo tro malmulte sciis pri nia lingvo, apenaŭ ion pri la utilo, kiun gi povas alporti. Montriĝis necese prezenti al tiu ĉi virga kampo facile kompreneblajn pruvojn por veki aktivan simpation, tiel mankantan en tiu ĉi lando. Mi decidiĝis ilin prepari, havante iom da sperto pri simila agado en tre diversaj cirkonstancoj. Por mallongigi tiun ĉi rakonton, mi notos ĉi tie kelkajn detalojn pri nur unu sektoro de mia laboro, pri spertoj akiritaj dum preparo de la materialo kaj pri la fina rezulto.

Mi verkis artikolojn pri iuj specialaj problemoj de Israelo, kiuj laŭ mia opinio povus kelkiun interesi kaj mi petis kelkajn Delegitojn de UEA (laŭeble FD de tiuj fakoj), ke ili faru tradukon kaj provu publikigon en iu gazeto de sia lando. Unu el tiuj artikoloj temis pri la lerneja sistemo de Israelo kaj pri ĝi mi volas raporti.

Mi sendis tiun tekston al 21 landoj. En 6 el ili mi atingis pozitivan rezulton, kion mi prave konsideras bona sukceso. Mi direktas publikan dankon al tiuj amikoj, kiuj komprenis la gravecon de la akompanaj linioj, ne ŝparis penon kaj subtenis mian entreprenon. Ili estas (inter krampoj nomo de la gazeto) : en Danujo s-o L. Friis (Danske skolon), en Finnlando s-o Hannes Koivu (Opettajain lehti), en Francujo s-ino Blanche Clavier (L'éducation nationale), en Germanujo s-o Alfred Bräuer (Die Berliner Schule), en Japanujo s-o Rinzo Okumuna (Kjooiku-kai), en Jugoslavujo s-o Fran Novljan (Život i škola).

Kiel multflanka estis utilo de tiuj publikaĵoj ! Krom sia unua celo — informi pri la temo — ili atentigis milojn da legantoj — per noto pri la esperanta deveno de la artikolo — pri servo plenumata de nia lingvo kaj fine, sed ne lastrange, ili donis en miajn manojn la instrumenton, menciitan en la unuaj linioj de tiu ĉi artikolo : nerefuteblan pruvon pri praktika utiligeblo de Esperanto.

Mi ne volas preterlasi dankon ankaŭ al tiuj miaj helpantoj, kiuj fidele strečis siajn fortojn por plenumi tiun taskon, sed kies klopodo restis senfrukta. Mi devas citi la gesamideanojn : Hans Bakker el Nederlando, Clelia Conterno Guglielminetti el Italujo, Pearl Hanks el Aŭstralio, David Kennedy el Anglujo, L. Krajíc el Ĉeĥoslovakujo, Li Laojon el Ĉinujo, S. Sakellaropoulos el Grekujo, Datoe Toemenggoeng el Indonezio kaj L.O. h'Uiggins el Irlando. Estis diversaj motivoj (politikaj k.a.), kiuj malhelpis. Tio validis eble ankaŭ ĉe la lasta kategorio de miaj adresitoj (en Hungarujo, Koreo, Polujo, Portugalujo, Svedujo k.a.), kiuj neniel reagis, kvankam mi pedante plenumis ĉiujn kondiĉojn de servopeto. Mi nomus ĉi tie ankaŭ Nepalon, sed ĝuste dum tiuj ĉi tagoj klarigis al mi s-o Ŝri Praŝad Ŝtresta el tiu lando persone la kaŭzon de sia tiama silento.

Kun la supre menciitaj gazetoj en la mano kaj kun alia materialo ankoraŭ menciota ĉi tie mi faris viziton al ministerioj kaj superaj organoj de Histadrut, potencega laborista organizo en Israelo. Per buŝo de siaj gvidantaj oficistoj ili rekonis fakton al ili ĝis tiam neniel konatan, ke per unusola lingvo laŭ simpla maniero estis atingitaj rondoj, kien ne enpenetris ilia propra amase disvastigata kaj multekosta materialo en la t.n. mondlingvoj. Ili estis grave impresitaj, kiam mi povis samtempe prezenti la unuan tradukon, kiu aperis el hebrea literaturo en lingvo vietnama kaj estis preparita laŭ Esperanto-teksto, kiam ili trovis en programo de la koncerto "La Mediteraneo kantas", kiun aŭdigis unuaranga kantista ĥoro jugoslava en vico de landoj, israelajn kantojn de mi liveritajn, kiam ili aŭdis, ke surbaze de Esperanto-artikolo danaj samideanoj vizitis Israelon, kiam ili rigardis elekton de valoraj verkoj el ĉeĥa literaturo, kiuj per helpo de Esperanto estis eldonitaj en diversaj lingvoj aziaj.

La intereso kaj konvinko restis ĉe tiuj decidaj instancoj de la ŝtato kaj ĉe okazo, kiu sin prezentos, seriozaj esperantistoj povos kolekti fruktojn.

LUMO KAJ OBSKURO

(Internacia Arta Teatro ricevis ŝtatan subvencion)

Grava novaĵo ! La sekretariato de la Asocio de Jugoslavaj Dramverkistoj sciigis al la direktoro de la Internacia Arta Teatro, s-ro Flego, ke la Konsilantaro por Kulturo de la Popola Kroata Respubliko (ekvivalento de Ministerio por Kulturo) aprobis lian peton pri ŝtata subvencio por IAT, kaj ke la aprobita sumo de miliono kaj duono da dinaroj troviĝas ĉe la Asocio je la dispono de Internacia Arta Teatro.

La evento estas gravega ! Povas esti ke tiun decidon de la Konsilantaro por Kulturo de la Popola Kroata Respubliko oni estonte konsideros kiel historian, decidan eventon ne nur sur la kampo de esp. teatro, sed ankaŭ sur la kampo de teatro ĝenerale. Ĝi povas esti gravega evento en la historio de la Internacia Lingvo mem.

La peticion apogis, inter aliaj, la Asocio de Jugoslaviaj Dramverkistoj, du direktoroj de zagrebaj teatroj kaj unuopaj elstaraj personoj el kultura kaj arta kampo en Jugoslavio. Ĝin apogis ankaŭ UEA kaj LKK de la 47 a U.K. en Kopenhago.

Tiu sukceso estas gravega kaj kuraĝiga. Ĝi pruvas ke la klopodoj de Internacia Arta Teatro kaj de ĝia direktoro, dank' al bone pripensita konstrua laboro, spite al malfacilaĵoj, obstakloj kaj konstraŭstaroj, jam efike sukcesis interesigi la neesperantistajn teatrajn kaj kulturajn mediojn por la ideo de esp. teatro. Pli ol oni povis antaŭesperi !

Por tiuj kiuj bone konas la progreseman mondan orientiĝon de la nova Jugoslavio, neniel estas mirige ke ĝuste la jugoslaviaj kulturaj instancoj kaj personecoj montris aparte grandan komprenemon por la problemoj de vera internacia teatro. Ja la popoloj kaj kulturoj kies nacia esprimlingvo ne povas pretendi je internacia uzo suferas pro tiu stato en sia vivo kaj agado. Ne mirige do ke la vera Internacia Lingvo renkontas kaj renkontos ĉe ili simpation, aprobon kaj helpon.

Kaj tre certe tiu tendenco montriĝos estonte eĉ pli forta. Kiam, tre baldaŭ, tute finiĝos la procezo de la politika kolonia liberiĝo, pli akuta fariĝos la lukto por la liberiĝo de kultura koloniismo, kio estas eĉ pli ĝenerala mondproblemo ol hieraŭ estis la problemo de politika koloniismo.

En tiu kultura liberiĝo la Internacia Lingvo nepre ludos plej elstaran aktivan rolon, kondiĉe ke ni esperantistoj mem estu konsciaj pri la graveco de tiu aktuala historia rolo, kondiĉe ke ni nin ĵetu en tiun liberigan batalon kiel plej aktiva antaŭeniranta taĉmento, kondiĉe ke ni ne dronu en marĉan indiferenton pri niaj propraj celoj kaj idealoj !

La Internacia Arta Teatro troviĝas jam ses jarojn en unuaj vicoj de tiu batalo. Ĝi merite kaj sukcese laboris, precipe kiam oni pripensas kiom kruele mankis al ĝi dekomence kaj daŭre plu mankas, la plej esenca apogo, la plej memkomprenebla apogo, sen kiu eĉ ne havis sencon ion ajn komenci, sen kiu certe ne havos sencon plu daŭrigi : la amasa apogo de la esperantistoj mem.

Ke tiel, sen firma grundo sub la piedoj, ŝvebante en aero super verdaj marĉaj akvoj, — la Internacia Arta Teatro sukcesis realigi tion kion ĝi realigis, atingi tion kion ĝi atingis — montras ke ĝia vivovolo kaj ĝiaj kapabloj estas ankoraŭ fortaj. Tamen ili ne estas neelĉerpeblaj. Krome, ĉar tiu apogo estas esenca, la demando prezentiĝas hamletece : Esti aŭ ne esti ! Post ioma ŝvebado, sen tiu helpo, ĝi riskas fali, droni en la verdajn akvojn. Do, aŭ IAT havos tiun esencan apogon, aŭ ĝi ne plu estos !

Tamen, ĉu ne strange ke en esperantistaj aferoj neesperantistoj donas ekzemplon al esperantistoj ! Signifa ankaŭ estas la fakto ke la peticion de s-ro Flego pri la ŝtata subvencio al IAT plej varme apogis la potenca Asocio de Jugoslaviaj Dramverkistoj — kaj, en komuna rekomendo, ankaŭ du direktoroj de la ĉefaj zagrebaj teatroj, s-roj Budak kaj Roksandić, kiuj jam dekomence de la laboro de Internacia Arta Teatro montriĝis plej favoraj kaj helpemaj al ĝi — kaj sen kies helpo cetere la tuta ĝisnuna plurjara laboro de IAT tute ne estus ebla.

Tion ni devas substreki, ĉar la esperantistoj ŝajnas havi eĉ ne la plej minimuman ideon pri la homaj, materiaj, financaj kaj teknikaj bezonoj kiun teatro postulas en plej preciza kunordigo. Precipe pro aparte malfacilaj kondiĉoj en kiuj troviĝas esp. teatro en la nuna komenca periodo ! Ili tute simple imagas ke se IAT sukcesas prezenti teatraĵojn dumkongrese, tio signifas ke ĝi jam firme ekzistas, prosperas, verŝajne eĉ alportas profitojn, kaj ke ĝi do neniun plian helpon bezonas. Anstataŭ helpon, ĝi prefere ricevu kritikojn !

Senpripensaj pensoj ! La kritikoj certe honorigas la Internacian Artan Teatron, eĉ kiam ili estas komplete malĝustaj, nekonstruaj, sensciaj, pretendemaj aŭ eĉ malicaj ! Ĉar, spite al alia rekta malutilo kaj sabota efiko, ili ankaŭ, certagrade, pruvas nian sukcesan laboron. Sed la Internacia Arta Teatro, precipe en sia komenca periodo, kiam ĝi ankoraŭ tute ne ekzistas kiel firma organismo, kiam ĝi ankoraŭ eĉ ne embrio de teatro estas, bonvolu tion kompreni, bezonus multe malpli da detrua kritiko, da indiferento, da ĵaluzoj, da rekta malamikeco kaj bremsado — ol helpon, amikan, aktivan helpon plej diversan de ĉiuj kiuj sin deklaras esperantistoj.

Car, efektive, ju pli IAT antaŭeniros sur neesperantistaj kampoj, des pli evidenta, des pli plumba, des pli detrua kaj fiaskiga montriĝos la manko de amasa mecenatara apogo de konscia esp. teatra publiko. Sen publiko teatro ne ekzistas nek povas ekzisti ! Neniu eksteresperantista organismo emos doni la necesajn fortegajn helpojn, kiuj estos nepre necesaj por solvi la financajn problemojn de estonta esp. teatro, se evidentiĝas ke tiu teatro estas sen minimuma publiko !

Male, konscia, amase organizita internacia esp. teatra publiko, eĉ finance modeste forta, estus, per si mem tiom alloga morala kapitalo ke jam per si mem ĝi antaŭcertigus la sukcesan starigon de Internacia Arta Teatro kaj de esp. teatro ĝenerale ! La demando nur estas : Ĉu la nunaj esperantistaj generacioj estas sufiĉe maturaj por alkonsciigi tion al si ?

Mi petas pardonon al malmultnombraj Amikoj de IAT pro tiuj kelkaj vortoj, neniel al ili direktitaj. Pli ol memkompreneble ! Se entute la IAT daŭrigas plu barakti, estas nur dank' al ili, dank' al iliaj kuraĝigoj. Ĉar ili donas almenaŭ la esperon ke tiu esenca punkto por esp. teatro povus estonte eble pliboniĝi. Ĉu nur iluzio ?

Teatro estas vivanta, penetra esprimo de vivanta kreopova popolo. Teatro, kiun ĝia publiko forlasas aŭ ne subtenas — mortas. Popolo sen teatro — estas popolo morta.

S.F.

TRO MALMULTE DA NEDERLANDAJ INTERPRETISTOJ EN EŬROPO

(De nia Brusela korespondanto)

"En Eŭropo estas multe tro malmultaj nederlandaj interpretistoj!" Tion diris S-ino René van Hoof kaj ŝi estas kompetenta. Ŝi estas ĉefino de la interpretist sekcio de ĉiuj eŭropaj organizaĵoj en Bruselo, funkcio kiu ne kaŭzas al ŝi grizajn harojn nur dank' al hidrargeca humoro, akrobateca improviza kapablo kaj respektinda faka scio.

Konstante funkcias sub ŝi ne malpli ol dudek kvin unuarangaj interpretistoj je salajroj de 1800 ĝis pli ol 2200 gld. monate, impostliberaj. Sed por organizi, ke ministro Luns en la ministraro de la Eŭropa merkato povu sekvi kion lia kolego Segni el Romo eble volas intrigi kaj por reliefigi la elokventecon de Spaak antaŭ S-ro Erhard, por ebligi al la agrikulturaj ekspertizistoj progreseme batali kaj por zorgi ke vivu la Socio-Ekonomia Komitato, por ĉio ĉi S-ino Van Hoof bezonas ĉiutage ne dudek kvin, sed okdek ĝis naŭdek interpretistojn.

Tiujn ŝi ne havas, sed tamen ili venas, vagonare aŭ aviadile el Parizo, Londono, Ĝenevo kaj se necese, el Milano aŭ Romo. Kontraŭ kompenso de la vojaĝ- kaj restadkostoj kaj honorario de cent ĝis cent kvindek guldenoj tage.

KONSIDERINDAJ SUMOJ

Kun kapabla stabo S-ino Van Hoof telegrafas kaj telefonas tiucele multlingve je tre altaj sumoj, ŝiaj skemoj pri prizorgendaj Eŭro-kunsidoj ampleksas paperfoliojn longajn je multaj metroj; kompreneble la nomojn kaj adresojn de ĉiuj interpretistoj en Eŭropo ŝi konas. Tiu ekscio de la nomoj ne estas malfacila.

La gesinjoroj interpretistoj de tiu ĉi terglobo — komplete konsciaj pri sia ĉiopovo malorganizi la tutan konferencantan mondon per unu sola strikosemajno — estas firme organizitaj en unu granta interkontinenta organizaĵo sub gvidado de eks-rusa princo Andronikof, ĉefinterpretisto de la franca ministerio pri eksterlandaj aferoj.

La klubo nomiĝas "Association Internationale des Interprètes de Conférences", aŭ en la ĉiutaga parolo nomita l'AIEK.

Kiu volas organizi internaciajn konferencojn, devas esti en bonaj rilatoj kun princo Andronikof kaj la AIEK. La bonaj rilatoj estas precipe difinitaj de la preteco pagi la preskribitajn honorariojn.

Nur kelkaj nederlandanoj estas membroj de A.I.I.C. je tuta membronombro en Eŭropo de 211 (el kiuj 203 havas la anglan kiel laborlingvon, 202 la francan, 120 la germanan, 60 la italan kaj nur 18 la nederlandan. Kiel montriĝas laŭ tio ĉi, bona interpretisto do majstras plurajn lingvojn).

La sekvo de tiuj ĉi proporcioj : "Fariĝas ĉiam pli malfacile plenigi la kabinojn por la nederlanda, fariĝas maleble", deklaras S-ino Van Hoof.

Ŝi konsentas: nederlandanoj kiuj anoncas sin je la Eŭropaj instancoj devas plenumi tre altajn postulojn, ili devas aktive majstri tri lingvojn. "Ĉar ne estas certe, ke ankaŭ la nederlanda restos laborlingvo".

Tio ĉi estas alia esenca eŭropa problemo. Se baldaŭ Britujo aliĝos al la Eŭropa merkato kaj eble ankaŭ Danlando ..... ĉu tiam la nederlanda kaj itala devas resti oficialaj apud la franca, germana kaj angla? "Neimageble, neeble, frenezaĵo", diras René van Hoof. Diskutado fariĝos malebla. "Praktike formortos". Jam nun, pro embaraso, oni se iel eble laboras per la sistemo „dukvar". Tio signifas, ke oni tradukas nur en la francan kaj germanan. Alie dirite: nederlandano aŭ italo rajtas paroli en propra lingvo, sed oni supozas, ke ili sufiĉe bone scias la francan aŭ germanan por sekvi en unu el ĉi tiuj "grandaj lingvoj" kion diras la aliaj.

UNIVERSITATA STUDO

Kio kaŭzas, ke estas tiel malmultaj nederlandaj interpretistoj? René van Hoof ne scias. Eble pro nescio pri la eblecoj. Aŭ eble pro la altaj postuloj. Bona interpretisto devas esti plenuminta universitatan studon. La ideala laŭ René van Hoof estas miksaĵo de juro kaj ekonomio kun finstudo aŭ ĉe la Pariza Sorbonne, aŭ ĉe la interpretista universitato en Ĝenevo.

René van Hoof mem estas lingva miraklo. Ŝi naskiĝis en Kolonjo, sed sepjara ŝi rifuĝis kun sia familio al Nederlando. Ekslernantoj de la Vondellernejo en Aerdenhout eble rememoras ankoraŭ pri René Herz. Ŝi estas ankoraŭ same vigla kaj rapida.

PRIVATA INTERPRETISTO

En 1942 (Germana okupacio) la familio Herz kaŝiĝis en Belgujo. La rezulto por René Van Hoof-Herz: senakcenta nederlanda kaj regado de ĉiuj novaj laŭmodaj vortoj, same senakcenta franca kaj germana, ŝia gepatra lingvo. Finstudis pri ĝermanaj lingvoj en la Libera Universitato de Bruselo kaj malkovrita kiel interpretisto sur ŝipo al Usono de Paul Henri Spaak, kun kiu ŝi vojaĝis tra la mondo kiel privata interpretisto kaj kiu ankoraŭ ĉiam, se necese, apelacias al ŝi. Unufoje semajne ŝi veturas al Parizo por instrui ĉe la Sorbonne en — la nederlanda.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne komprenis: ŝi serĉas interpretistojn! Radoj je la eŭropa veturilo!

☆

El : "Het Vrije Volk", Rotterdam, 19.5.62.

Vizito al Greka Printempo

Mi havas strangan amikon en Germanujo. Kiam mi antaŭ kelkaj jaroj renkontis lin en Jugoslavio, li rekomendis al mi la libron "Eta Princo" de Saint-Exupéry. Tiun libron li poste donacis al mi, kaj nun ĝi enestas mian valizon dum ĉiuj vojaĝoj. Ĉar la ekkonon de tiu libro mi ŝuldas al mia germana amiko, ŝajnas al mi ke nian amikecon mi ŝuldas al tiu libro. Homo kiu sincere rekomendas "Etan Princon" povas esti nur bona. Tial mi diris stranga, tiom strange bona.

Mi forgesis diri: li estas doktoriĝinta profesoro, mi persista studento. Ekde nia renkontiĝo en 1959, ni faris kune kelkajn vojaĝetojn kaj vojaĝojn. Komence, kiam ni estis nur konatoj, sufiĉis nia denaske lama franca lingvo. Poste mi lernis la anglan, kiun li jam konis, kaj ni komencis uzi ĝin. Ne plu nur konatoj, amikoj ni estas kaj ni parolas aŭ korespondas pri diversaj aferoj. Dum nia lasta kuna vojaĝo, en aprilo ĉijara, ni vizitis monaĥejojn de la Sankta Montaro Athos en Greklando. Unika dektaga vagado tra la vasta vivanta muzeo de la bizanca gloro! Plej ofte ni silentis antaŭ la nobla trankvilo de sanktaj vizaĝoj kiujn eternigis la ora mano de nekonata pentrema piulo. Sed poste, ekstere, rajdante al nova monaĥejo-muzeo, ni ofte volis laŭte admiri tion kion ni vidis. Tamen, kutime ni silentis.

Unue diris mi al li, kaj poste li al mi proksimume la saman aferon: 'Se vi vere estas nur tiom inteligenta kiom oni el viaj frazoj povus konkludi, mi hontus havi tiel stultan amikon." Kaj niaj frazoj jam delonge ne estas nur anglaj. Kutime ni interparolas per stranga miksaĵo de la angla, franca, rusa, serbokroata, germana kaj ankoraŭ kelkaj lingvoj. Du aŭ tri el tiuj lingvoj ni konas tamen nur tiom malbone kiom al miloj da homoj sufiĉas por fiere deklari "Mi parolas la anglan! .... francan!.... rusan!.... ktp:" Kiam ni du estis nur konatoj, ankaŭ al ni niaj lingvaĵoj sufiĉis por tiaj deklaroj kaj por nia ĝentila senenhava konversacio. Amikiĝinte nun, ni volus multon unu al la alia diri, multon serioze pridiskuti, priesplori. Mankas al ni komuna lingvo kaj ni kutime silentas aŭ ree igas nian konversacion esti ĝentile senenhava, kiel decas al konatoj sed ne al amikoj.

Por solvi la problemon, mia strange bona amiko tute ordinare proponas ke mi lernu la germanan. Mi konsentas tion fari, sed ne por nia estonta konversacio. Kiam mi ekbalbutos la germanan, mi tamen preferos uzi la anglan en la rilatoj kun mia germana amiko. Tiel ni ambaŭ restos sur la glita, senfekunda lingva tereno. Ĉar, dum ĉiuj tiuj jaroj pri kiuj mi parolas al vi, mi nealtrudeme proponas Esperanton al la profesoro. Sed li, kiu rekomendis al mi "Etan Princon", perfidas la idearon de tiu bela libro kaj rezonas simile al miloj kiuj "ne interesiĝas" aŭ "opinias ke...."

Jen la unua rakonteto kiun mi kunportis el Greklando. Ĉu ne, ke ĝi estas pli aŭtuna ol printempa afero! Sed, ĉar mi ŝuldas ion printempan, jen nun io tute alispeca, io gaja, vere printempa, ĝojiga:

Kiel kutime kiam mi vojaĝas, mi antaŭplanis renkonti esperantistojn en Greklando. La sola pli granda loko kiun ni vizitis estis Tesaloniko. Feliĉe, iom antaŭ ol ni forveturis al Greklando, de tie en Beogradon venis s-anino Rosa Skolnik, argentinanino kiu ege simpatie pledas por nia movado kaj dum siaj vojaĝoj servas al ĝi. D-rino Skolnik provizis min per kelkaj adresoj kiuj, kiam mi venis en Tesalonikon helpis al mi facile trovi grekajn samideanojn.

Aŭdinte Esperanton malantaŭ la pordo, mi frapis kaj eniris. Mi ne sciis ke temas pri instruhoro, mi provis iom atendi ekstere. Sed, S-ro Johano Kotitsas, vicdirektoro de la loka Porinstruista lernejo, tuj ĉesis instrui, vidinte ke venas eksterlandano. Oni petis min prezentiĝi al la plenplena saloneto kaj poste, mi devis fari paroladeton pri la lastaj atingaĵoj kaj perspektivoj de nia movado. La simpatiaj junaj vizaĝoj el kiuj konsistis la aŭskultantaro plene atentis kaj kvazaŭ glutis ĉiun mian vorton. Poste ili interesiĝis pri la movado en mia lando kaj aliloke, mi demandis ilin pri ilia klubo kaj provis kuraĝigi ilian decidon lerni Esperanton. Bedaŭrinde, ni baldaŭ devis disiĝi ĉar venis novaj kursanoj.

Dum mia posta mallonga interparolo kun la gvidantoj de la loka movado mi eksciis multajn ĝojigajn faktojn. Min precipe ravigis la nombro de la nunaj kursanoj: entute 138! Tion oni plejparte devus danki al profesoro Kotitsas kiu gvidas ĉiujn kursojn kaj persone montras eksterordinaran progreson, kvankam li komencis lerni la lingvon nur antaŭ kelkaj monatoj. Ankaŭ la aliaj samideanoj, inter kiuj kelkaj estas malnovaj esperantistoj, helpas la laboron de s-ro Kotitsas. Entute, tre simpatia, vigla, printempa atmosfero de juneco kaj aktivo regas inter tesalonikaj esperantistoj.

Jam tie mi decidis skribi ion pri ili kaj mi interesiĝis ankaŭ pri la pasinteco kaj novaj planoj de la Tesalonika Esperanto-Ligo, kiel oficiale nomiĝas la movado tie. Ankaŭ tiuj informoj estis simpatiaj kaj fidoplenaj. Mi aŭdis ke la movado en ĉi tiu urbo naskiĝis en 1933 kaj iel progresis ĝis la milito. Tre plaĉa estas la fakto ke en la jaro 1958 ses lokaj esperantistoj kolektis inter si monon por lui klubejon. Ankoraŭfoje mi aŭdis ion kio min igas fidi al la progreso de unu ideo, kiun oni per pura amo nutras. Kaj pri planoj de la tesalonikaj samideanoj, mi ne volas ankoraŭ paroli, ĉar mi de ili ne petis permeson publikigi tiujn planojn. Tiuj planoj estas tiel grandaj kaj gravaj ke mi ne kuraĝas paroli pri ili sen permeso. Cetere, se ili efektiviĝos, vi aŭdos pri Tesaloniko kaj ĝiaj esperantistoj.

Tiun vesperon mi meznokte revenis en mian hotelon. La morgaŭan tagon mi estis malgaja kaj neparolema. Mia amiko demandis min pri kialoj de tia humoro, kaj mi respondis ke ĝin kaŭzis la beleco de la antaŭa vespero. Mi komparis la atmosferon kiu kreiĝis inter grekaj samideanoj kaj mi dum unu sola vespero kun tiu, kiu dum tri aŭ kvar jaroj kreiĝas inter mia germana amiko kaj mi. Ne nur egala, sed eĉ pli intima estas tiu atmosfero kiu naskiĝis en Tesaloniko ol tiu kiu dum jaroj kreiĝas. Kaj ĉio nur dank' al la komuna lingvo. Tiom bele, ke estas strange iom!

Simo Milojević

Hugo Kraus


NI ESTIS EN LA ESPERANTO-GOLFO PRIMOŜTENO

Kiam sinjoro majoro Sinner, ĉefdelegito de la Universala Esperanto-Asocio por Aŭstrujo, transsendis al mi leteron de doktoro Ivo Rotkviĉ, direktoro de la Naturscienca Societo de Zagrebo, per kiu oni invitis nin al feriado en la Esperanto-Kampadejo Primoŝteno, duoninsuleto ĉe la bordo de la lazura Adriatiko inter Ŝibeniko kaj Splito, tiam kaptis min ne nur la ideo pri Esperantista ripozejo ĉe la romantika marbordo de Dalmatio per si mem, sed ravis min speciale la entreprenemo, ideabundo kaj entuziasmo de la aranĝantoj - la junaj astronomoj-esperantistoj de la Astronomia Observatorio Zagrebo. Nun ni scias, ke prave ni fidis al tiuj gesamideanoj, ĉar niaj travivaĵoj en la paradiza regiono ĉemara kun popoleto simpatia, en rondo de diversnaciaj, gajaj homoj ĉiuaĝaj, kiuj flue parolis la Internacian Lingvon, estis vere belegaj kaj unikaj. Ni tie trovis geamikojn por la tuta vivo. Ĉu mirige, ke dum la adiaŭo ni interŝanĝis kisojn kaj verŝis larmojn, kaj ke tiu adiaŭo estis regata ekskluzive de unu deziregо : la revenemo por la revido kaj alvenigo de kiel eble plej multaj parencoj kaj geamikoj en la nuna jaro ?

Starante sur la pinto de la "Azenmonto", ni havas antaŭ ni panoramon, kiu gvidas nian rigardon suben, super la maron transen al Primoŝteno, la vilaĝego sur monteto, kronita per preĝejo. Iam antaŭe ĝi estis insulo interligita kun la kontinento per ponto. Nun la ponton anstataŭas digo, larĝiĝinta je strato. Malantaŭ Primoŝteno, blanke lumanta per siaj kalkŝtonaj domoj en la matena sunlumo, la marbordo ŝovas eksteren al la maro arbaran terlangon, kiu duoncirkle ĉirkaŭas la Esperanto-Golfon. Sur ĝi kuŝas, kaŝate sub bonaromaj pinioj, la tendaro kun siaj restoracio, Societa kaj Sanitara Domoj. Direktante niajn okulojn laŭlonge de la golforiĉa marbordo, ni supozas en la malklareta malproksimo Ŝibenikon, elirejon por la ŝipa kaj aŭtobusa finveturo al Primoŝteno. Kelkcentmetrojn for de la Esperanto-duoninsulo elmaras la insuleto Smokvica, populare nomata "Insulo de la Amo".

En la Esperanto-Golfo salutis nin aro da gesamideanoj el Jugoslavio, Francujo, Italujo, Svisujo, Belgujo, el Salzburg, Innsbruck, Knittelfeld, Graz, Linz, Wiener Neustadt kaj el Vieno. Brunuliĝinte ili staris antaŭ ni, kun radiantaj vizaĝoj. La klarakva, malprofunda golfo estas kvazaŭ kreita por la banado, kaj baldaŭ ni estis esplorintaj helpe de niaj marvitroj ĝiajn flaŭron kaj faŭnon. Metinte la kapon nur ete kun la mergvitro en la akvon, ni opiniis, meze inter la preternaĝantaj fiŝoj kaj la vegetaĵaro fiksita sur la fundo, ke subite oni iĝis ero de nova, fremda vivkomuno.

Sub la ĉiam brilanta suno dum niaj kunestadoj en la golfo, dum niaj promenoj, ekskursoj al Splito, Rogoznica, Ŝibeniko, al la Krka-akvofaloj ktp, dum niaj vesperaj kantadoj sur la teraso de la restoracio, ĉiam manifestis sin tiu ĉi delikata atmosfero, kiu nur povas estiĝi dum kunvenoj de la Esperantistoj. Neniu inter ni povos forgesi la ĉarman piknikon sur la Insulo de la Amo. La apetitige krustrostitaj ŝafidoj estis battranĉataj je porcioj sur granda breto. Intertempe lokanoj preparis por ni panon, cepojn, tomatojn, piprofruktojn kaj la faman Primoŝtenan ruĝan vinon, ankaŭ akvon por laŭdezira aldono. Ho, kia agrabla kaj petoleta festeno estis tio ! Sa-



mideano el Graz surprizis nin per bonegaj magiaj artifikaĵoj, kiuj havigis al li la ripetan aplaŭdadon de la "insulanoj". Poste oni kuniĝis grupe, ekprenis gitaron, mandolinon kaj violonon. Niaj jugoslavaj geamikoj ravis nin per siaj belsonaj popolkantoj. Tie kaj tie ĉi tiu harmonia animstato kulminis per interfratiĝoj kun ĉirkaubrakoj kaj kisoj, ankaŭ kun la neesperantistaj lokanoj. Tial la reveturantaj boatoj portis super la kristpajn ondojn societon, pro la sukceso de la tago ĝoje agorditan.

En la tendaro domtendoj sur ligna planko kun du feraj litoj matracitaj kaj kun depon-stableto invitas al agrabla loĝado. Sed estas ankaŭ eble, bone resti en privataj domoj kaj en hoteleto. La pensiona manĝo estis tute kontentiga. La tendaro disponas pri elektra lumo, akvokranoj, akvonecesejoj, lavujoj, duŝiloj. Promenejoj gvidas al la tendara centro, la Societa Domo kun la restoracio.

Niaj ferioj ne nur estis ripozigaj. Ili donis al ni plimulton ol somerumado kutime povas doni. La pluso, kiu nin tiel entuziasmigis, estis la sento de kora simpatio kun homoj, kiujn ligas komuna nobla strebado : la strebado al vera, feliĉiga homeco, kiun ne malhelpas diverseco de naciaj lingvoj. Tiu sento, ke staras vidalvide homo kaj homo, ne fremdulo al fremdulo, la jugoslavo al aŭstriano, franco al germano, nederlandano al italo. Nia entuzisamiga travivaĵo estis la "Nova Sento" de la nova homa etiko !

Nian specialan dankon ni direktas al la junaj astronomoj-esperantistoj, kiuj kvazaŭ gefamilianoj, kariĝis al ni. Ilian ĉefon, doktoron Divjanoviĉ, ni adoras kun ili.

Venu en tiu ĉi somero kun ni al la Esperanto-Ferioparadizo Primoŝteno !

Ni travivu tie komune, sur la lazura bordo de la Adriatiko, Esperantujon ! Kompreneble ankaŭ viaj parencoj kaj amikoj neesperantistaj estos kore bonvenigataj. Informu kaj anoncu vin en "Esperanto- Kampadejo Primoŝten" ĉe Ŝibenik, Jugoslavio !



LA ESPERANTO-MOVADO KAJ NEŬTRALECO

La ĉefa principo de la Esperanto-movado, tradicie kaj firme enradikiĝinta en la mensojn de la esperantistaro, estas neŭtraleco. Regularoj de la Esperanto-organizaĵoj plejparte deklaras ilin neŭtralaj rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. La afero ŝajnas klara kaj sendiskuta, sed ĉu efektive ĝi estas tia ? Oni devas respondi al tri tute nefacilaj demandoj :

1. **Kion fakte signifas neŭtraleco de la Esperanto-movado ?**
2. **Ĉu la Esperanto-movado estas efektive neŭtrala ?**
3. **Ĉu la Esperanto-movado devas esti neŭtrala ?**

Sen kompreni tiujn aferojn absolute ne eblas fari prudentajn paŝojn koncerne la disvolvon de Esperanto en tiel ja komplikitaj rilatoj de la nuntempa mondo.

Neŭtraleco de la movado

Antaŭ ĉio necesas dispartigi du ĝenerale misligatajn kaj tute malsamajn aferojn : neŭtralecon de Esperanto kaj neŭtralecon de la Esperanto-movado.

Oni kutime nomas Esperanton lingvo neŭtrala. Vere, Esperanto estas neŭtrala objektive pro la fakto, ke ĝi estas lingvo internacia. Ĝia neŭtraleco enteniĝas en tio, ke por ĝi estas indiferenta la ideo de nacieco, aŭ alivorte, ke ĉiuj homoj en la mondo troviĝas en la sama rilato al Esperanto, ĉar ĝi estas nenies lingvo gepatra. Nur laŭ tiu vidpunkto oni povas paroli pri neŭtraleco de Esperanto. Pro miskompreno oni ofte konstatas, ke lingvo neŭtrala estas lingvo, kiu servas por neŭtralaj celoj. Ĉu el tiu vidpunkto oni povas trakti pri neŭtraleco ? Certe ne. Neŭtraleco troviĝas en la kategorio de celoj, neniam en tiu de rimedoj, kaj kiel tia ĝi ne povas esti neŭtrala aŭ ne neŭtrala.

Estus absurde aserti, ke la ĉevaloj, kiuj dum la unua mondmilito trankvile en Svisujo plugis, estis neŭtralaj, kaj tiuj germanaj trenantaj kanonojn — ne. Same absurda estas konstato pri neŭtraleco de Esperanto rilate al politiko, religio ktp.

Do se oni parolas pri neŭtraleco, tiam ĉi tio ne povas koncerni Esperanton, sed sole la Esperanto-movadon. La Movado vivas en socio, ĉar ĝi estas socia fenomeno. Ĝi povas favori, kontraŭstari aŭ trakti indiferente opiniojn aŭ agojn de aliaj sociorganismoj (laŭ larĝa senco). La indiferenta rilato signifas neŭtralecon. Ekzemple Pola Esperanto-Asocio estas neŭtrala rilate al la religio, ĉar estas por ĝi indiferenta la opinio de unu soci-parto, kiu kredas ekziston de la Dio kaj tiu de alia, por kiu Dio ne ekzistis.

Ŝajnas do ke la esenco de neŭtraleco enteniĝas en indiferenta rilato koncerne la opiniojn, agojn kaj konfliktojn de aliaj soci-organismoj.

Kiel do difini neŭtralecon de la Esperanto-movado ? Ŝajnas eble konstati, uzante parte la statutajn vortojn /§ 4 de la Statuto de UEA/, ke neŭtraleco de la Movado estas ĝia indiferenta rilato al nacieco, raso, religio, politiko. La Statuto diras ankaŭ pri neŭtraleco rilate al sociaj problemoj, sed tio ŝajnas miskompreno. Kiamaniere la Esperanto movado, kiu mem estas socia fenomeno kaj agas en socio, povas esti indiferenta rilate al ĉiuj sociaj problemoj ? Se tiuj problemoj koncernas naciecon, religion, rason kaj politikon — jes, sed ĉu la Esperanto-movado povas esti neŭtrala al aliaj sociaj problemoj ? Ja la afero de tutmonda interkompreniĝo estas ankaŭ socia problemo . . . . .

Ĉu la Esperanto-movado estas neŭtrala ?

Estas absolute sendube, ke Universala Esperanto-Asocio prezentiĝas kiel modele neŭtrala organizo internacia. Kontraŭe oni povas diri pri multaj enlandaj movadoj. Oni povas nomi vicon de esperantaj publikaĵoj kun difinita politika orientiĝo. La samo rilatas al multaj esperantaj radio-programoj. Estas dubinde, ĉu Seminarioj de Germana Esperanto Junularo, kiuj traktas politikajn temojn, atestas pri neŭtraleco de tiu organizaĵo. Ankaŭ Pola Esperanto-movado akceptis principojn kunlabori kun la landaj Junularaj Organizaĵoj, kiuj ja tute ne estas neŭtralaj. Oni aŭdas, ke neŭtraleco rilate religion en kelkaj esperantaj medioj ne estas respektata.

Ĝenerale la faktoj refutas legendon pri neŭtraleco de la Movado. La Movado ne estas tutece neŭtrala. Ĉu estas malbone ? Miaopinie — ne.

Ĉu la Esperanto Movado devas esti neŭtrala ?

Ĝustan respondon eblas trovi nur rigardante la aferon flanke de la celo de la Movado. La celo de la Movado estas, ke esperanto fariĝu rimedo de tutmonda interkompreniĝo. Por la Movado neniu tasko estas pli grava ol la devo atingi la celon. Se la Movado volas atingi la celon, ĝi devas agi nur laŭ manieroj, kiuj helpas la celon realigi. Konsekvence, se estas sendube, ke neŭtraleco helpas atingi la celon, la Movado estu neŭtrala, se ĝi malhelpas — la Movado forlasu ĝin. Nur tio povas esti racia motivigo de la neŭtraleco.

Sendube sur tiu ĉi principo apogas sin UEA. La neceso plaĉi al ĉiu ŝtato, al ĉiu socia grupo, al ĉiu homo — postulas de tiu ĉi organizo konstantan ekvilibron pri neŭtraleco. Se UEA ĉesus esti neŭtrala ekzemple rilate al politiko, ĝi devus fali kiel organizo internacia. Klare, ke neŭtraleco estas helpfaktoro en agado de UEA.

Ĉu tamen neŭtraleco ĉiam faciligas la agadon ? Ofte — ne. Kompreneble, kiam ni deklaras esti neŭtralaj, ni mem limigas kvanton de agebloj pri kiuj ni disponas. Ni mem ligas niajn manojn. Laŭ sperto ni scias, ke ĉiu enlanda movado estas pli favore traktata de la ŝtataj instancoj, se ili vidas, ke tiu movado portas avantaĝojn por la socio. Kaj ĉu nuntempe estas ebla serioza agado sen favoro kaj helpo de la ŝtatoj ? Ĉu estas prudente rifuzi tian helpon, kiu ja kontribuas al la celatingo ? Kompreneble ne !

Sole la postuloj de la celatingo povas determini, ĉu la movado estu, aŭ ne estu neŭtrala. La Movado povas esti nur aktive neŭtrala. "Tiun neŭtralecon oni nomas aktiva, kiu helpas atingi la ĉefan celon" —diras la komentario al la Deklaro pri Kunlaboro subskribita de la 7 landaj Sekcioj de TEJO pasintjare en Wokingham. Ŝajnas, ke tiu ĉi difino estas ĝusta kaj preciza.

Resume ŝajnas motivigeblaj jenaj konkludoj koncerne neŭtralecon de la Esperanto Movado :

La teoria konkludo — neŭtralecon de la Movado determinas ĝia celo; tio signifas, ke neŭtraleco estas ĝusta nur tiam, kiam ĝi helpas atingi la celon.

La praktika konkludo : — La Internacia Esperanto-Movado devas esti neŭtrala, la enlanda — prefere ne.

Roman Dobrzyński

(represo de "Tamen" — Bulteno de Pola Esperanto Junularo).

LA KOKINEJO

de Albert Samyn

Kial la diablo ne volis ke mi konstruu kokinejon en la ĝardeno de mia bangalo, mi ne scias. Sed ke li ne volis ĝin, tio estas fakto pri kio neniu dubu. Aŭskultu nur la diablaĵojn kaj sortobatojn, kiujn konstruonte mi spertis, kaj vi facile konvinkiĝos, mi kredas, kia ajn estas via vivkoncepto.

Enkonduke, permesu ke ni rapide interkonatiĝu. Mi prezentas min : Ernest Vanlint, ordinara librotenisto de la konata Brusela meblo-magazeno "La moderna Hejmo A.S.", 50-jara, preskaŭ kalva, ruĝvanga kaj iom dikventra pro la senĉese kontorsida laboro. Mia edzino nomiĝas Marta kaj mia filino Claudine. Pri Marta vi sufiĉe ekscios dum la disvolviĝo de mia rakonto. Pri Claudine mi nur diras, ke antaŭ du jaroj kaj apenaŭ plenaĝa, ŝi edziniĝis al Daniel Dupré, unu pala, multpretenda impost-komizo, kiun mi en la fundo de l'koro abomenetis. Sed kion fari ? Pri amaj gustoj de sia filino la patro prefere ne diskutu !

Unu jaron antaŭ la edziniĝo de Claudine, mia edzino ege plendis pro rendoloroj kaj iĝis tiel nerva, ke eĉ tramsonorilo ŝin incitis. Tio repensigis nin pri tereno de pli ol tridek aroj, kiun ni de longe heredis en la vilaĝo B., proksimume dek ses kilometrojn sude de Bruselo. Post iom da hezito ni sekvis la konsilon de la familia kuracisto kaj iris la vojon, kiun jam iris multaj grandurbanoj, t.e. : ni konstruigis nian propran bangalon sur nia propra tereno kaj unu belan tagon transloĝiĝis al B. — Ne grimacu, kiam mi asertas, ke al mia grandurbana animo ekde la komenco tre plaĉis la kamparana vivo. Venu ĉe mi, se vi ne fidas miajn vortojn, kaj propraokule konstatu, mi kore invitas vin. Ho, tie regas libero, tie ne plu ĝenas tramsonoriloj kaj aŭtobremsoj, nek disputoj inter la najbaroj de la aliaj etaĝoj. Tie, ĉe la rando de vasta arbaro, abundas freŝa aero kaj ripoziga trankvilo. Tuj mia jam rigidiĝinta korpo kvazaŭ tiris el la tero revigligajn sukojn. Ankaŭ la plendoj de Marta pri rendoloroj kaj nervoj malpliiĝis kaj baldaŭ komplete ĉesis. Kaj ĉar nian apartamenton transprenis la juna paro, ni ankoraŭ pasigis de tempo al tempo kelkajn tagojn en la urbo. Unuvorte, ni estis feliĉaj !

Tamen ne mankis tiklaj problemoj ! Ne timu, mi neniel intencas tedi vin per privataĵoj, mi simple aludas la fakton, ke pro la konstruado de la bangalo (kvankam ĝi estas tute modesta kiel decas al modesta librotenisto) kaj pro la meblado de la nova hejmo (kvankam mi profitis de ĉiuj eblaj favorkondiĉoj de la magazeno) funde elĉerpiĝis miaj monrezervoj. Mi eĉ devis pruntopreni konsiderindajn sumojn de amikoj kaj konatoj. Kaj tio ne malhelpis, ke Marta ankoraŭ trovas ke sen aŭto nia garaĝeto terure faŭkas, mi do plenigu ĝin kiel eble plej baldaŭ! En tiaj cirkonstancoj la devizo ĉe mi povas nur esti: ŝpari kaj ĉiam pli ŝparadi! En si mem malgaja vivperspektivo, sendube, sed konsolas min la espero ke ĝi ne eterne daŭros. Cetere, ĉie en la lando sennombraj kolegoj partoprenas la saman sorton. Mi do ne paŭtas kaj mem stimulas min, ĉiun nigran penson forfajfante el la animo.

Duan problemon metis antaŭ min la vasteco de mia tereno. Ĉu vi konscias, kion sovaĝa herbaĉejo de pli ol tridek aroj signifas por homo, sensperta en kamparaj laboroj kaj devigata ordigi kaj kulturi ĝin en sia libertempo ? Mi rekonas, ke tutsola mi certe estus fiaskiĝinta. Sed helpeman manon kaj valorajn konsilojn mi ricevis de Frans, mia gajmiena najbaro. Kiel pensiita ĝendarmo li jam de multaj jaroj loĝis en la vilaĝo, estis mirinda lertulo en la solvo de bangalaj demandoj kaj per kunigitaj fortoj ni metamorfozis la antaŭan herbaĉejon en ĉarman, ridetantan etbienon. Ni falĉis, fosis, sterkis, sarkis, rastis kaj semis, ni pretigis gazonojn, florbedojn kaj padojn, ni faris heĝojn kaj plantis arbojn kaj arbustojn. Mi ne plidetaligos, se pri tio vi eble interesiĝas, mi ripetas mian inviton : venu kaj vidu mem ! Kompreneble, multo estas ankoraŭ farenda. Sed ni firme daŭrigas, jen kio estas la plej grava !

☆

La pasintan aŭtunon Frans sugestis, ke mi konstruu kokinejon. Kaj per tiu sugesto li elvokis por mi trian problemon, laŭŝajne sensignifan kompare kun la aliaj (kio estas pli ordinara ol kokinejo ?) kaj tamen ....

— "Sur tereno kiel via, vi devas havi kokinejon, Ernest," li diris. "Ĝi estas la unua paŝo al plena kampara vivo, kredu min. Kaj krome, profitdona !"

— "Mi ne kontestas. Sed konstrui kostas monon !"

— "Ni povus mem konstrui ĝin."

— "Jes. Sed restas ankoraŭ la materialo..."

— "Ankaŭ tio vin ne ĝenu ! Vi turnu vin al entrepreno de malkonstruado. Hejme mi havas la adreson de unu bona, en antaŭurbo de Bruselo."

— "Aŭskultu, Frans, via ideo ege min allogas. Sed ni iomete atendu. Ĝis la printempo. Intertempe jam donu al mi la adreson."

— "Laŭ via plaĉo. Ni atendos".

Li iris for, serĉis la adreson, notis ĝin sur papereton kaj mi ŝovis tiun en mian monujon, kie lastatempe abundis loko por paperetoj tiuspecaj. Poste mi komencis freneze ŝparegi, severe evitis eĉ la plej etajn elspezojn, ne fumis plu kaj trinkis akvon anstataŭ bieron. Sed ĉar Marta jam antaŭe ege reduktis mian fum- kaj trinkmonon, la ŝparitaj sumoj nur tre malrapide kreskis. Kaj ŝi avertis min, ke kvankam kore konsentante ke mi havu kokinejon, ŝi tamen ne unu cendon kontribuos por ĝi. Ni unue repagu la pruntepreniten monon kaj tuj poste kredite aĉetu la aŭton, ŝi decidis. Jen kion oni povas nomi klara lingvo ! Por akiri la materialon de la kokinejo mi do klopodu kaj baraktu sola. Kaj Sankta Antonio benu min !

Pasis Kristnasko, pasis la monato de la novjaraj festoj kaj bondeziroj. Venis februaro, alportanta al ni, inter kapricaj pluvegoj kaj furiozaj ventopuŝoj, ankaŭ la antaŭsignojn de la proksima renoviĝo :

> "Tempo de l'gaja mesaĝo,
> sendependa tempo, kreanta propran vivon...
> la aero estas miliona tremado de vivo ĉirkaŭe.
> Nenie detala pruvo de l'printempo. Nur ĝenerala
> spiro."

kiel diris iu moderna poeto. Unu vendredan vesperon, ĝuste antaŭ la fino de la laborsemajno, nia ĉeflibrotenisto kvazaŭ ensaltis la kontoron kaj proponis ke mi escepte venu morgaŭ, sabaton, por fari du-tri urĝegajn taskojn. Lia propono ne konvenis al mi, mi ja nepre bezonas la sabatojn por miaj kamparaj laboroj, sed rifuzi estis neeble kaj damnante lin en la koro, mi pale ridetis kaj akceptis.

Hejme mi raportis al Marta pri mia malbonŝanco.

— "Sed kontraŭe, koincidas bone !" Ŝi ekkriis. "Mi devas aĉeti amason da etaĵoj por la hejmo. Mi do akompanos vin al la urbo morgaŭ matene. Kaj mi atendos vin ĉe Claudine, ni diru je la sesa vespere, tiel ni kune revojaĝos je la oka. Nu, kio estas al vi ?"

— "Mi pensas pri mia kokinejo," mi grumblis. "Ankoraŭ nenion mi faris por ĝi. Mi eĉ ne scias...."

— "Ĉit, ĉit, la afero ne brulas !" ŝi interrompis. "Kion

vi ne faros ĉi semajnofinon, vi faru ĝin la sekvantan." Kaj per tiu virina logiko fermiĝis la debato.

☆

Sabaton ! Kvazaŭ por primoki mian mizeron, la vetero estis ekde la mateno eksterordinare milda kaj bela. Tial en la trajno, kiu veturigis nin al la urbo, mi malĝoje mutis, dum Marta des pli obstine babiladis. Elirante la stacidomon, mi respiris, tuj "ĝis revid' "—is "ĉe Claudine" kaj rapidis al mia nun trifoje malbenita meblomagazeno. Tie mi trafis en alian malagrablaĵon. Apenaŭ malŝlosinte la pordon de la kvara etaĝo, kie troviĝas la kontoroj, mi aŭdis bruan ĝojkrion kaj viglan paŝetadon en la koridoro. Mire mi levis la kapon kaj staris nazon ĉe nazo antaŭ F-ino Rosette, la sekretariino de nia direktoro.

— "Ĉu vi, fraŭlino ? Kion vi serĉas ĉi tie ?"
— "Vin mem, kara Ernest ! Ĉu vi ne vidas ?"
— "Ĉu ankaŭ vi laboras hodiaŭ ?"
— "Je-es ! Mi asistos vin. La direktoro ĝin volis."
— "Hm ! Ĉu ankoraŭ aliaj venos ?"
— "Ho ne ! Ni du ja sufiĉas ! Sed vi aspektas tute ne entuziasme.... Ĉu esti sola kun mi vin ĝenas, Ernest ?

Aŭ ĉu vi timas vian edzinon ? Jes, mi vetas ke ŝi estas ankoraŭ ĵaluza pri vi ! Kaj verdire, ŝi ne malpravas..."
— "Jam bone ! Ĉesigu la stultaĵojn kaj venu. Ni tuj eklaboros, por ke kiel eble plej baldaŭ ni eliru el ĉi tiu dezerto."
— "Konsentite, kondiĉe ke ni **kune** eliru, ĉu ?" ŝi duonmoke logis min.
Mi ne respondis.

☆

Eklaborante, mi pripensis la situacion, en kiu mi troviĝis. — Kvankam Marta, kiel solida burĝino, koleras la alterne flirt- kaj stretjupajn, dekoltitajn kaj parfumitajn kontor-koketulinojn, kvankam nian blondan, langolertan sekretariinon mi certe ne emus prilaŭdi hejme, tamen en si mem ŝia ĉeesto estis bagatelo. Kial mi, plenmatura viro, ja ne serioze kunlaborus kun ŝi, kiu laŭaĝe povus esti mia filino, ŝi vivu eĉ pli frivole ol oni flustras ! En mia juneco, kiam mi ardis de amo kaj bolis de energio, jes, tiam, eble mi riskus... Sed nun ! Pasis mia tempo de kverado, nur pri kokinejo mi ankoraŭ pasiiĝas. Aliflanke ni efektive ne estis tutsolaj ! La subaj etaĝoj, kie oni ekspozicias la meblojn, estis malfermitaj kaj pluraj vendistinoj tie servis la klientojn. Krome tra la magazeno vagadis maljuna Fred, la pordisto. Eĉ la plej kalumniaj langoj ne sukcesus vere kompromiti min. Malpli do ĝenis min la neatendita asistantino ol la fakto, ke mi ne diris ĝin al Marta. Kial, diable, la ĉeflibrotenisto ne avertis min ? Ĉu eble li mem ne sciis, kiam mi hieraŭ hejmeniris, ke ankaŭ ŝi venos ? Nu, la kaŭzo estu tiu aŭ alia, sed kamuflos ŝin neniu rezonado. Senvole mi ĵetis sur ŝin kaŝitan rigardon. Diligente ŝi laboris. Des pli bone ! Kaj forĉasante ĉiujn eksterprofesiajn pensojn, mi miavice enprofundiĝis en la dokumentojn sur mia skribotablo.

☆

Tiel rapide ni progresis, ke jam antaŭ la tria posttagmeze ni finis. Pro ĝojo Rosette preskaŭ saltis al mia kolo (mi diras : preskaŭ !) kaj tuj okupiĝis pri pudro kaj liprugilo. Dume mi iris al la fenestro kaj rigardis eksteren.
— "Nu, Ernest," ŝi sirenis, "kion ni faru ?"
— "Mia edzino atendas min je la sesa..."
— "Ni do havas tri plenajn horojn...."
— "Ho vi ! Ĉiam pli ekscesa !"
— "Povas esti. Sed vi ne respondis al mia demando."
En tiu momento trafis min ekfulma ideo kaj kvazaŭ al mi mem mi diris :
— "La vetero estas bela kaj mi disponas pri sufiĉe da tempo. Kial do mi ne promenadus ĝis la urbolimo ? Ĝis ia entrepreno de malkonstruado, kies adreson mi havas en mia monujo ? La promenado postulos proksimume unu horon kaj je la kvara mi jam estos tie. Kaj se la entrepreno estas fermita, mi tamen ĝuos la veteron. Do ek !"
Mi dekroĉis mian mantelon de la vestohoko.
— "Kaj mi iros kun vi !" ŝi jubilis, leviĝante.
— "Mi petas, Rosette, ĉesigu la mokadon ! Jam delonge ĝi ne plu incitas min."
— "Mi parolas serioze. Jes ! Mi ŝatas akompani vin !"
— "Sed tie ja estas nenio interesa por vi !"
— "Egale, mi volas ! Virina kaprico ! Nu, diru kiel bona paĉjo al sia filino ke vi konsentas."
— "Mi ne estas bona paĉjo kaj, feliĉe, vi ne estas mia filino ! Tamen, se vi volas, eĉ diablo vin ne retenos ! Kvankam la ideo estas stulta, idiota...."
— "Vi estas karulo, Ernest ! Kaj mi solene promesas, ke ni disiĝos ĉe la enirejo de la entrepreno. Tiel vi trankvile povos viziti ĝin. Mi iomete vagulos en la ĉirkaŭaĵo, iros en restoracion kaj en filmteatron, kaj poste tre saĝe revenos al mia apartamento.. Ĉu plaĉas ?"
— "Plaĉus ankoraŭ pli sen via ekstravaganco !"
— "Ĉu vere, vi kredas ?" ŝi okulume petolis.

☆

PROF. LAPENNA EN NEDERLANDO

Tri gravaj prelegoj

La Institucio "Esperanto en la Lernejoj", kiu jam faris multe da utila laboro por prepari la terenon por la enkonduko de Esperanto en la nederlandajn lernejojn, sukcesis aranĝi du prelegojn en porinstruistaj seminarioj, en Rotterdam kaj Haarlem, kaj unu prelegon por la instruistoj de Hago. Ĉiuj tri prelegoj okazis vendredon la 15-an de junio 1962. La Institucio utiligis la okazon ke Prof. Lapenna troviĝis en Nederlando kiel invitita gasto de la Beneluksa kongreso je Pentekosto kaj restis kelkajn pliajn tagojn en la lando por privataj aranĝoj.

La direktoro de la Institucio, Mag. F. Winkel, organizis ĉion tre kompetente. Matene je la 10-a horo Prof. Lapenna estis tre afable akceptita de la direktoro kaj instruistaro de la Katolika Seminario "Thomas Morus" en Rotterdam. Pli ol cent lernantoj kaj la plimulto de la instruistoj aŭskultis prelegon pri : "La lingva problemo kaj la solvo kiun prezentas Esperanto". Poste multaj demandoj montris viglan interesiĝon pri la temo. Malgrandan libroekspozicion oni poste tiel longe rigardis, ke fine oni devis rapidege enpaki ĉion por aŭtomobile veturi al Haarlem, kie je la 14-a horo komenciĝis simila aranĝo en la ŝtata porinstruista seminario. La tiea direktoro, mem entuziasma favoranto de la lingvo kaj iam eklerninta ĝin, faris apartan instigan paroladon al la gestudentoj kaj eĉ skribis esperantlingvan frazon sur la nigran tabulon. Kvankam estis varmega tago, en la plenplena salono — ankaŭ tie estis ĉ. 100 aŭskultantoj — la atento estis senteble streĉita kaj per aplaŭdego la gejunuloj dankis Prof. Lapenna pro lia viveca ekspono de la tuta problemaro. Ĉeestis la prelegon ankaŭ S-ro Suurmans, kiu pli frue jam instruis Esperanton en tiu seminario. Antaŭvideble el tiu ĉi prelego rezultos por li nova kurso.

Estis preskaŭ la 17-a horo kiam venis tempo por iom da ripozo kaj manĝo, post kio oni veturis al Hago. Tie la Institucio estis invitinta la membrojn de la diversaj unuiĝoj de instruistoj. Ĉeestis ĉ. 50 personoj. Ankaŭ tie oni rimarkis la saman streĉan interesiĝon pri la temo, kiel montris la postaj demandoj.

Sendube tiu ĉi tago — ege laciga por la preleganto — multe kontribuis al pli bona kompreno de la lingva problemo kaj forigo de antaŭjuĝoj, en medioj de la instruado en Nederlando. Precipe grava tio estas en kunligo kun la nuna propono ebligi en la nederlanda leĝaro la libervolan instruadon de la Internacia Lingvo.

Ĉiujn tri prelegojn tre taŭge enkondukis Mag. Winkel. La tujan tradukadon de la esperantlingvaj prelegoj faris F-ino Vermaas.

M. H. V.

Kvazaŭ flarinte la aferon, maljuna Fred, el la fenestro de la pordistejo, malicete mansignis al mi, kiam ni eliris el la magazeno. Mi sentis, ke lia rigardo traboras mian dorson. ĝis ni malaperis post la stratangulo. Sed nia promenado ne estis tio, kion li imagis ! Rosette rakontis mil sensencaĵojn, kiujn mi ne atentis, ĉar mi revis pri mia kokinejo. Ŝia hela voĉo tamen de tempo al tempo rememorigis min pri Claudine. Ankaŭ tiu estas tajpistino kaj modernema, sed mi ne volis kredi, ke ŝi multe similus al la anserino apud mi. Nu, sufiĉe pri ŝi ! Resume mi diras, ke prudente evitinte la ĉefavenuojn pro timo de katastrofa interpuŝo kun iu de miaj familianoj, ni je la kvara kaj kvarono jam atingis la celon de nia irado. Ni disiĝis iom brue, kiel gekamaradoj. Kvazaŭ peza ŝtono falis de mia koro.

Jen mi staris sola en senviva strato, dum forsonis la paŝoj de Rosette. Antaŭ mi larĝe malfermita pordego, sur kiu granda tabulo indikis :

Firmo Bert Bal kaj filo
- Malkonstruado -
Ĉiuspecaj Materialoj
ENIRO LIBERA

Ambaŭflanke de la entrepreno kaj transe de la strato estis imponaj fabrikoj, kiuj ne funkciis. En la korto, antaŭ kontoraĉo, kvar viroj ĵetis trabojn sur ŝarĝaŭton. Mi eniris. Unu momenton ili rigardis min, sed tuj daŭrigis la ŝarĝadon, kvazaŭ mi ne ekzistus. Bone ! Ankaŭ senvidanto mi povis komenci mian viziton. La tereno havis grandegan superficon kaj baldaŭ mi malaperis inter la malnovaj konstrumaterialoj, kiuj sur ĝi amasiĝis. Mi ne tedos vin per teknika priskribo, sed mi estus fiegoisto, se mi ne atentigus vin, ke vi povas fari tie mirigajn bonaĉetojn kaj ne nur por kokinejo ! Tamen, vi estu prudenta ! Mi mem tiel profunde interesiĝis, ke la krepusko devis konsciigi min, ke estas urĝa tempo por reiri. Kvazaŭ antaŭsentante ion malbonan, mi kuris al la enirejo. Alveninte tie, mi abrupte haltis. Ŝrumpis mia koro kaj skuiĝis mia korpo. Antaŭ mi malplena spaco ! Sur la korto ne plu viroj nek ŝarĝaŭto. Neniu. Mallumo. Vako. Kaj mia rigardo gluiĝis al la rustita kateno, per kiu la pordego estis malcedeme ŝlosita. — *"Nom' de dĵi'!"* mi duonlaŭte blasfemis, " ĉu eble ?"

Pardonu la krudan esprimon ! Sed ĉio, kion mi nun dum pli ol tri horoj travivis, turmentas ankoraŭ mian memoron kiel groteska terurfilmo. Tien kaj reen mi iris, dekfoje, centfoje, sencele. Mi kriis, kriegis por savo, sed eĉ kato ne miaŭis al mia alvoko. Mi esperis trovi telefonon en la kontorbudaĉo, sed... espero logas kaj mensogas ! Baldaŭ estis densa mallumo ĉirkaŭe. Helpon mi ne atendu de la mortdezerta strato, nek de la nefunkciantaj fabrikoj dekstre kaj maldekstre. Kaj de la posta flanko ? Tie troviĝis alta tabulbarilo, tra kies fendoj mi vidis vastegan senkulturejon. Post tiu verŝajne estis granda trafikvojo, ĉar en la malproksimo moviĝis senfina vico da aŭtolumoj. Mi bone aŭdis la obtuzan bruadon, sed estus sensence provi ke mia voĉo atingus la vojon. Minutoj sin trenis kiel horoj. — Kion pensos Marta, kion ŝi faros, mi demandis min. **Se** ŝi telefonos al la magazeno kaj se maljuna Fred dekroĉos, li **eble** diros, ke mi foriris kun Rosette. Kaj tiu, **se** ŝi estas hejme, **povus** indiki kie ni disiĝis. Tiu cirkonstancaro, kun siaj "eble" kaj "se" kaj "povus" certe ne kvietigis min. Ho, se mi estus nur dudekjara, mi facile suprengrimpus sur la barilo ! Sed nun, vidu min, dikventran, rigidan karikaturon de mi mem ! Laciĝinte pro la sencela paŝado, mi kaŭris sur la sojlo de la kontoraĉo. Tie falis sur min la vespera malvarmo, mi tremetis, releviĝis kaj repaŝadis. Mi malsatis. Sekiĝis mia buŝo. Kapdoloroj min atakis. Eĉ pensi mi ne povis plu. Al la diablo mia kokinejo kaj ĉiuj kokinoj de l' mondo ! Mizere mi apogis mian febran frunton sur palison. Teruraj fantomaĵoj eliris el ombraj abismoj de mia animo kaj incendiis mian cerbon. Flagris flamoj. Fajrego. Kaj ĉirkaŭ la flamoj **ŝi** dancis. Jes : ŝi ! Pro honto mi, brava etburĝo, kiu baldaŭ festos sian arĝentan edziĝo-jubileon, preskaŭ ne kuraĝas konfesi ĝin. Dancis ŝi, la ruĝjupa diablidino, provoke svingante la korpon : "Mi ŝatas akompani vin, Ernest !" .... "Virina kaprico nu !"... "Ni havas tri plenajn horojn."... "Ne fuĝu, karulo !"... "Mi volas vin, VOLAS VIN !" — "Sankta Antonio," mi anhele preĝis, "helpon ! Trovu por mi eliron el ĉi infero kaj forĉasu la sukubon !" Sed raŭkis mia voĉo kaj la preĝo, anstataŭ leviĝi al la ĉielo, forbrulis en la flamoj. Daŭris la danco, eĉ pli tente... "Mi volas vin, Ernest !"... "Ĉu esti sola kun mi vin ĝenas ?"... "Ĉu vi timas vian edzinon ? Hahaha !" — — — Ŝia rido disŝiris mian animon kaj arĝente reeĥadis post la tabuloj...

Mi eksaltis. Ĉu vere ? Ĉu ne halucino ? Ne ! Post la tabulbarilo mi efektive aŭdis ĝin, sonantan kiel trilrido de tikliĝema knabino.

— "He ! Ĉu iu estas tie ?" mi kriis.

Silento !

Tra fendo boris miaj okuloj en la mallumon.

— "He ! Vi, kiu estas tie, respondu ! Mi estas enŝlosita en la rubejo. Venu kaj helpu min !"

Tute proksime de mi murmuris voĉoj, realaj homaj voĉoj. Paŝoj. Fajrero de ekbruligita cigaredo. Antaŭ mi, sur la senkulturejo, staris bubaĉo, maksimume deksesjara.

— "Nu, kio estas al vi ?" li brutale demandis, blovante fumnubeton en la fendo, tra kiu mi rigardis. "Kion vi faraĉas ĉi tie ?"

Lia aroganta tono kaj manieroj ne plaĉis al mi, mi volonte donus fortan piedbaton sur lian postaĵon, sed li estis mia sola ŝanco por eliri. Mi do subenglutis mian koleron kaj afable eksplikis mian aventuron.

— "Nu, aĉa situacio por vi !" li konkludis. "Kiel mi ja helpu vin ?"

— "Tre facile ! Serĉu policanon, mi petas."


Li rikanis longe.

— "Mi bedaŭras, sinjoro, sed ĝuste tion mi ne faros. Hej-

Ŝaka Rubriko

(Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Problemo n-ro 21/konkurso 1962 - nro 5/
J. Breuer/Schweizer Arbeiter-Schachzeitung 1954/



Mato en 3 movoj/pro ĝusta solvo 3 poentoj/
Kontrolo : Bl. : Rf3, Dh5, Ka7, Ĉc8
Ni. : Ra8, Ĉe7, p. : b7

Solvojn sendu al gvidanto de Ŝaka rubriko, Dro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio ĝis 31.9.62.

me oni ja kredas min en filmteatro. Kaj oni ne eksciu, ke en ĉi malfrua horo mi vagadas ĉi tie."
— "Kun knabino?" mi aludis.
— "Kun mia fianĉino," li stulte-pedante korektis. "Miaj maljunuloj ŝin ne toleras. Domaĝe! Sed ili ne sukcesos ĉagreni nin, ĉu ne, kolombinjo?"

Denove mi ekaŭdis helan trilridon en la ombro, sed ŝi ne montris sin.
— "Mi tamen devas eliri de ĉi tie!"
— "Sendube vi devas! La demando estas nur: kiam? Ĉiuokaze, lundon matene oni malŝlosos la pordegon."

La sentaŭgulo! Kaptu lin la diablo ĉe la kolo! Sed mia sorto estis en liaj manoj kaj mi petis, repetis, petegis lin.
— "Ne ploraĉu, sinjoro!" li fine diris. "Vi tute ne bezonas policanon. Mi bonege konas ĉi rubejon. Antaŭe mi multe ludis en la ĉirkaŭaĵo kaj mi rememoras, ke ie en la barilo troviĝas truo. Ĝi estas fermita per tabulo, sed tiun ni ja forigos. Venu, ni serĉu la lokon."

Kune ni serĉis, mi miaflanke, la gekveruloj siaflanke. Efektive, ni baldaŭ ĝin trovis. Post kelkaj piedbatoj tiel facile cedis la tabulo fermanta ĝin, ke unu momenton mi timis embuskon. Sed ardegante por eskapi, mi forĵetis mian malfidon kaj provis rampi tra la truo. Ĝi tamen montriĝis tro mallarĝa por mia korpulento. Miaj esperoj dispolviĝis kaj mi releviĝis, duonvoĉe blasfemante. Kion fari?
— "Ne senkuraĝiĝu, sinjoro," unuafoje alparolis min la knabino, "demetu vian mantelon kaj vian jakon, kaj ĉio bone iros."

Sorĉan voĉon ŝi ja havis, stimulan, ebriigan. Kaj tuj, kvazaŭ aŭtomate, mi ŝin obeis.
— "Donu la vestojn," ŝi samtone daŭrigis. "Mi tenos ilin dum vi elrampos. Tiel ili ne malpuriĝos."

Eta senkulpa mano ŝoviĝis tra la truo kaj senpripense mi metis en ĝin la vestojn. Malaperis la mano kun ili. Kaj jen, en la sama momento, trakuris malvarma tremetado mian dorson. Diable! Mia monujo! Kun la mono ŝparita por la kokinejo! Ĝi estis en la jako. Tuj mi ĵetis min teren kaj ree provis elrampi. Mia kapo senpene transpasis, sed la korpo ne sekvis. Mi tordiĝis ĉiudirekten, sed ne sukcesis. La gejunuloj dume flustradis inter si. Mi turnis la kapon por vidi, kion ili komplotas. Tiam abrupte falis vestaĵo sur min. Ĉio nigra.
— "Ni ĵus trovis, kion ni bezonas!" cinikis la bubaĉo. "Vian monujon ni danke akceptos pro nia helpo. Adiaŭ, sinjoro! Bonan ŝancon! Kaj agrablan nokton!"

Triafoje la knabino trilridis. Tuj poste kuregantaj paŝoj.
— "Ne risku tion, fripono!" mi furiozis el sub mia kovraĵo kaj per freneza kapskuo ĝin flankenĵetis. Vane! Jam for ili estis! Ĉirkaŭe nur mallumo, peza de silento. Surtere mi, simbole disigita: la kapon en senkulturejo, la korpon en rubejo. Kaj super mi la steloj, eterne pacaj, eterne indiferentaj al la homa sorto.

☆

Kiel mi eltordis min el la truo, mi ne scias. Sed post duonhoro da streĉa penado, mi fine liberiĝis. Kvazaŭ radumita mi prenis de la tero mian jakon kaj mantelon, surmetis ilin, kaj duonmorta, sen groŝo en la poŝo, mi foriris. Feliĉe la gebuboj ne ŝtelis mian tramkarton. Ĉe haltejo mi hisis min en tramveturilon. Kaj akurate je la deka kaj dek minutoj mi alvenis ĉe Claudine.

Ho, se mi estus melodrama aŭ sensacia verkisto, kiajn scenojn mi nun povus pentri! Sed mi estas nur simpla, raciema libroteniśto, kiu skrupule evitas ĉiajn vortekscesojn kaj emfazojn. Vi do afable kontentiĝu, aŭskultante la tieajn eventojn kaj imagante la reston.

Je la sesa: Marta, Claudine kaj Daniel min atendas.

Inter la sesa kaj la sepa: ili nerviĝas. — "Paĉjo ja ne kutimas malfruiĝi sen averti nin!" diras Marta.

Je la sepa: ŝi telefonas al la magazeno. Oni ne respondas. — "Ĉu la magazeno jam fermiĝis?"

Je la sepa kaj kvarono: Marta retelefonas. Sen rezultato.

Tuj poste: Daniel iras al la magazeno, por ke sur la loko mem li konstatu la kialojn de mia neklarigebla foresto.

Je la oka: post multaj klopodoj li trovas la pordiston. Maljuna Fred konfidencas al li "inter viroj" ke mi jam delonge forpromenis kun Rosette. — "Vi ja konas ŝin, la blondan! Kompreneble mi ne scias, kien ili iris."

Tuj poste: Daniel telefonas la novaĵon al Claudine. Konsterniĝo. Skandalo. Li rapidas al la apartamento de Rosette por eble kapti, ĉe la freŝa faro, la adultanton.

Je la naŭa: Li telefonas, ke Rosette ne estas hejme. — "Verŝajne ili estas kune, sed Dio scias kie! Nu, mi restos en la ĉirkaŭaĵo!"

Iom antaŭ la deka: li telefonas, ke Rosette revenis. Ŝi estis sola. Li ne kuraĝis alparoli ŝin. Pro honto!

Je la deka kaj dek minutoj: Paĉjo eniras la apartamenton de Claudine.

☆

Jes, mi eniris, tute konfuzite eniris. Kaj komencis nekredeblan, senkoheran rakonton, en kiu miksiĝis "rubejo" kaj "kokinejo" kaj "bubaĉo" kaj "ŝtelo" kaj "diablo" kaj tiel plu. Sed interrompis min samtempe edzino kaj filino. Kolereksplodis ili, kriege min riproĉis kaj histerie ploradis. Mi ne komprenis. Nur du vortoj konstante martelis miajn timpanojn: "Rosette kaj vi!"... "vi kaj Rosette!" ĝis fine mi ekkaptis la sencon de ilia kuniĝo. Oni suspektis min! Post ĉiuj mizeroj, kiujn mi travivis, oni suspektis, ke la tutan tempon mi ĝuamoris kun iu facilmora kontorfraŭlino! Jen kiel en ĉi mondo rekompenciĝas vira virto! "Tro", batis mia koro, "tro, tro!" Stariĝis ĉiuj haroj, kiujn mi ankoraŭ havis, mi malfermis la buŝon, pugnigis la manojn... Sed mi ne pugnobatis la tablon nek eldiris la krudajn vortojn, kiujn vi atendas. Ne, mi simple, kiel malsana hundo, eliris el la ĉambro.

Ambaŭ virinoj surprizite silentis, miris, sin rigardis. Tiam, ektimante, kuris post mi. Sur la trotuaro ili min atingis.
— "Ernest, kion vi volas fari?"
— "Mi?... Mi iras al la policejo kaj deklaros la ŝtelon, de kiu mi iĝis viktimo," mi respondis lace.

☆

La sekvantan matenon mi skribis indignan leteron al "Firmo Bert Bal kaj Filo — Malkonstruado", kies malatento estis la ĉefkaŭzo de mia fuŝ-aventuro.

Ke la polico ne malkovris la ŝtelistojn, pri tio vi ne miru. Same vi ne miru pri tio, ke post du tagoj mi konvinkis mian edzinon pri la pureco de miaj intencoj. Mi ne klarigos la kialojn, ĉar ili trenus min sur ĉu tro oficialan, ĉu tro intiman terenon, kaj krome, se vi havas kelkajn vivspertojn, vi jam divenis ilin.

Tamen, mirinda estas alia fakto. Ĉu vi povas kredi, ke post unu semajno mi ricevis respondon de la firmo "Bert Bal kaj Filo"? Ĉu vi povas kredi, ke en tiu respondo S-ro Bal esprimis sian bedaŭron pro la okazintaĵoj kaj kompromise proponis al mi **senpage** ĉiujn materialojn, kiujn mi bezonis por mia kokinejo? — — — Nu, vi kredu aŭ ne, egale, sed pasintan sabaton Frans kaj mi komencis la konstruadon. Jes, malgraŭ ĉiuj diablaĵoj kaj sortobatoj, mi havos mian kokinejon! Eble vi skuas la kapon kaj sulketigas la frunton, demandante la "profundan sencon" de ĉio ĉi tio. Bonege! La diablo flustru ĝin en vian orelon, la unuan fojon ke VI lin renkontos. Mi rekonas, ke mi ne okupiĝas pri ĝi. Kompreneble! Mi estas tro kontenta. Klukas jam la kokinoj en miaj revoj. Baldaŭ ili klukos en la ĝardeno post mia bangalo. Ĝis revido, kara! Nek diablo, nek sorto malesperigu vin!

Glosoj: -Bangalo: speco de malalta vilao
-sukubo: diablino kuŝanta kun viro

Noto: La citita poemfragmento estas el la poemo "Februaro" de la flandra poeto Paul Van Ostaijen (1896-1928)

14-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO KONGRESO

Budapest, 5-11 Majo 1962

Antaŭ tri jaroj, kiam la hungaraj fervojistaj esperantistoj iniciatis inviti la 14-an kongreson de IFEF al Budapest, la Hungara Revolucia Laborista Kamparana Registaro aprobis tion kaj donis permeson okazigi tiun kongreson en la jaro 1962, en Budapest. Tion sekvis la oficiala invito kaj naskiĝis la decido — dum la antaŭaj kongresoj en Helsinki kaj Barcelona — organizi la 14-an en la hungara ĉefurbo. Estas menciinde, ke la lasta kongreso — en Barcelona — okazis sen la popoldemokratianoj, kiuj ne ricevis la enirvizon de la hispana registaro.

Poste komenciĝis la celkonscia preparlaboro. La LKK kaj la helpantoj oferis multe da energio kaj tempo por prepari la kongreson kiel eble plej bone.

La organizantoj kalkulis maksimume 500 kongresanojn, tamen — kiel proksimiĝis la limdato de la aliĝo — jam meze de Marto evidentiĝis, ke la nombro de la partoprenantoj estos pli alta. La leteroj kun la aliĝiloj amase venis al LKK de tago al tago kaj komencis konturiĝi efektive internacia kongreso. Fakte, la 1-an de Aprilo estis registrita la 1000-a aliĝilo. Finfine alvenis 1080 aliĝiloj el 20 landoj.

Tiam ni vidis klare, kiel grandan taskon ni prenis sur niajn ŝultrojn, tamen ni fidis pri niaj agoj, ĉar ni havis la moralajn kaj materialajn subtenojn de niaj superuloj, kiuj ekde la komenco helpis al LKK.

Ne estas spaco detaligi kiom multflankajn laborojn faris la organizantoj, sed ni opinias, ke la rezultoj — kiujn la partoprenantoj povis ĝui dum la kongreso — parolis pli elokvente, ol la plej talenta oratoro. Por tiuj, kiuj ne partoprenis ni mencias nur pri kelkaj materialaj rezultoj. Tiuj estas : nova poŝtmarko — kies ĉefa motivo estas la kongresinsigno — eldonita de la Hungara Poŝto, — Il. poŝtkartoj pri Budapest kun esperanto surskribo, — artnivela mikrosondisko enhavanta "La Espero"-n kantitan de kvarvoĉa virĥoro, krome du ĥorajetojn esperantlingvajn kaj muzikaĵon "Marŝo de Rákóczi"/pri tiu sondisko estos aperigita aparta artikolo/, — prospektoj kun esperanta teksto pri nia Pionira Fervojo, pri Budapest kaj la lago Balaton, — specialaj trajnoj disponigitaj por la kongresanaro dum la tuttagaj ekskursoj, — senpaga liberbileto por ĉiuj kongresanoj; ĝi estis valida por ĉiuj trafikiloj en Budapest kaj en Hungarujo, — ĉiutaga fotoservo pri aktualaj kongresokazintaĵoj, —surtrajna poŝtoficejo dum la ekskursoj, k.a.

Kvankam laŭ nia opinio la vortoj ne kapablas respeguli fidele la eksterordinarajn sentojn, kiuj ekregis la memon de la partoprenantoj dum la kongresaj tagoj, tamen ni deziras rakonti pri kelkaj neforgeseblaj programeroj.

Unue, la malferma solenaĵo, dum kiu la ĉefprotektanto de la kongreso Stefano KOSSA, Ministro de Trafiko kaj Poŝto, faris la festparolon, kiel malnova esperantisto nature en Esperanto. Lia senpera kaj bonhumora karaktero kreis en la kongresejo — kaj ekster la kongresejo dum la komuna fotografado — intiman, amikan atmosferon al la kongresanaro. Ni citas kelkajn frazojn el lia parolo : " . . . . ni deziras prezenti al ĉiuj kongresanoj, kion konstruis la liberiĝinta hungara popolo dum 17 jaroj kaj kiel vivas en nia lando la homoj" — "Ni bone scias, ke la homa kulturo povas evolui nur inter pacaj cirkonstancoj, ĝuste pro tio ni batalas ĉiam kaj ĉie por la paco kaj ĉiuj esperantistoj en la mondo devas agi same".

Dum la unua tuttaga ekskurso al la Norda Regiono de Hungarujo oni vizitis la urbon Miskolc, kies rapida evoluo kaptis la ĝeneralan atenton. Poste okazis peraŭtobusa veturo al Lillafüred, al la iama ekskluziva amuzejo, nuntempe refreŝiĝejo de la laboruloj, intertempe modela



Dekstre : la poŝtmarko eldonita de la hungara poŝto okaze de la kongreso, kaj la oficiala kongresa poŝtstampo

gastigado kaj bonega tagmanĝo atendis la kongresanojn en la ŝtalurbo Diósgyör kaj poste . . . ek al la groto Aggtelek. La kongresanaro per impona aŭtobuskaravano /17 aŭtobusoj/vojaĝis tra la nova industria regiono — kies centro Kazincbarcika estas la dua socialista urbo de Hungarujo — al la celo de la ekskurso.

En la groto la mirindaj stalaktitoj kaj stalagmitoj ligis la atenton de la kongresanoj, kiuj post kvaronhora paŝado troviĝis en la granda "Koncertejo" kreita de la Naturo mem. Tie lokiĝis la fervojista "Filharmonica Orkestro" el la 600-jara urbo Debrecen, kiu prezentis la Esperanto-himnon. Estiĝis solena atmosfero kaj poste la elektra lumigado estingiĝis. La kelkmomenta mallumo kaŭzis certan miron, kiu pliiĝis kiam la kandeletoj ekbrulis ĉe la muziknotbretoj de la orkestranoj. La laŭtparolanto anoncis la sekvontan muzikaĵon: "Les Preludes" de Fr LISZT. Eksonis la majesta melodio, la belegajn akordojn plifortigis la stalaktitoj, kiuj donis la kadron — permane ne imiteblan — al la koncerto. Inundis la melodio la aŭskultantojn kiel la muziko de la sferoj. La koroj batis pli ritme, la gorĝoj premiĝis kaj la okuloj larmis pro la beleco de la muziko kaj anima plezuro, kiu — se estis eble — plialtiĝis, kiam sur la apuda stalagmito ekbrulis la bengala fajro kaj pentris la scenejon neimageble bela. Post la fina akordo la ĉeestantoj mute staris pro la sorĉo de la unika travivaĵo. Nur post kelkaj momentoj ektondris la aplaŭdo daŭrinta dum minutoj. Dank' al la orkestro kaj ĝia talenta dirigento Vilhelmo RUBÁNYI, la kongresanoj havigis tie ĝismortan travivaĵon. Laŭ la ĝenerala opinio, tiu unu programero superis la plenan atendemon de la kongresanoj.

La diversaj artaj kaj amuzigaj progameroj en Budapest, en la Kongresejo kaj Operejo — kiel la Festivalo de la hungaraj fervojistaj artensembleoj, Internacia Balo, baledo de Romeo kaj Julia, veturoj per la Pionira Fervojo, k.a. donis al ĉiuj kongresanoj belajn memoraĵojn.

Paralele kun la amuziga programo okazis ankaŭ la oficialaj kaj fakaj kunvenoj. Speciale estis interesa la fakprelego pri la "Evoluo de la relo-senbreĉigo kaj aplikado de la betonŝpaloj en Hungarujo" kaj la prezento de la plej nova speciala t.n. "Mezuril" vagono de la Hungara Ŝtatfervojo. LKK okazigis renkontiĝon ankaŭ por la fervojistaj pacbatalantoj. Tiun renkontiĝon partoprenis ankaŭ kelkaj gvidantoj de la Hungara Pacmovado, inter ili Árpád SZAKASITS, prezidanto de la Landa Packonsilantaro, Aleksandro HARMATI, ĉefsekretario de la Patrolanda Popolfronto, k.a. Tiuokaze oni pritraktis gravajn demandojn de la Pacmovado.

Fine ni devas mencii ankaŭ pri la Fermo de la Kon-

greso, kiu okazis ĉe la Balaton sur la duoninsulo Tihany. Ankaŭ tie regis la sama atmosfero, kiel dum la tuta kongreso. Nia ŝatata Ministro St. KOSSA surprizis la kongresanaron kaj partoprenis ankaŭ la lastan kunestadon, donacis fotoalbumon al ĉiuj landaj delegitoj, eĉ akompanis la kongresanojn sur la ŝipo veturanta de Tihany al Siófok tra la Balaton. Ankaŭ tiu tago estos longe memoriga por ĉiuj ĉeestintoj.

Tiel finiĝis la oficiala programo de la 14-a. La sekvontan tagon multaj kongresanoj vojaĝis hejmen, tamen la la 13-an ni organizis ankoraŭ unu ekskurson por la restintaj kongresanoj al la universitata urbo Szeged. Pli ol 300 gesamideanoj partoprenis tion, kiuj denove havis belajn okazaĵojn por riĉigi siajn "valizojn". La vizito en la tiea fervoja edukinstituto — kie ĵus okazis kortuŝa adiaŭa festeto de la abiturientaj gelernantoj — kaj en la Esperanto Muzeo, la promeno en la tre ĉarma urbo kaj fine la bonega tagmanĝo en la edukinstituto, plenumis ĉiujn dezirojn de la ekskursantoj.

Konsiderante pri la ĝisnunaj kritikoj, estas konstateble, ke la celo de la kongreso — la praktika uzado de la internacia lingvo sur fakaj terenoj por personaj sperto-ŝanĝoj, pruvo al la superuloj pri la taŭgeco de Esperanto inter teknikaj cirkonstancoj, plifortigo de la paca kunekzisto de la diversnaciuloj kaj doni al la eksterlandanoj realan bildon pri Hungarujo — estas atingita.

Ni ne promesis multe, tamen se nia kongreso kaj nia lando, Budapest kaj la Balaton faris ĝojon por la partoprenintoj, tiel ni estas kontentaj, havante tiun senton, ke nia laboro ne estis vana.

Ankoraŭ unu deziron ni havas al niaj estintaj gastoj: gardu la belajn memorojn pri ni kaj venu al Hungarujo ankaŭ en la venonto.

L. Kapitány

Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

Inĝ. Mario Simondetti: KIAMANIERE DISTINGI LA FUNGOJN? Eld. la aŭtoro, Torino 1961. 39p. 21,5 × 15,5 cm.

En Eŭropo kreskas multaj fungoj manĝeblaj, sed bedaŭrinde ankaŭ kelkaj specoj venenaj aŭ eĉ mortigaj, kaj estas nenia simpla provo distingi ilin. Plej gravaj inter la venenaj specoj estas kelkaj specoj da *Amanoides*, precipe *A. Phalloides* al kiu oni atribuas la grandan plimulton de la okazintaj mortiĝoj. Veneniĝo per tiu fungo bezonas tre malmulte da fungo, estas malfacile kuracebla pro longa latenteco de la efikoj, kaj ĝia metodo mortigi estas tre malagrabla. Necesa estas do facila metodo rekoni tiun murdiston. Krom tio la fungamanto bezonas scii antaŭe, ĉu li akiros frandaĵon, amaraĵon, aŭ ventrodoloron, kaj por tio li devas distingi la specon.

Por helpi lin Inĝ. Simondetti preparis sian ŝlosilon. La ideo estas ke fungamento rikoltinte sufiĉan fungon, faru serion da provoj, ĝis la ŝlosilo diru al li kaj la specon kaj la ecojn de la fungo. Por tio la grava parto de la teksto estas dividita en numeritaj ĉeloj. La unua ĉelo enhavas la unuan provon, laŭ kies rezultoj oni estas sendata al unu el ses aliaj ĉeloj kun pluaj provoj, kaj tiel sinsekve ĝis maksimume 11 tiaj ĉeloj. Sed unu provo (spordepono) bezonas kelkajn horojn, kaj la finaj ĉeloj ofte enhavas plurajn specojn, kies distingo bezonas plurajn provojn.

Do la programo estas sufiĉe komplika, kaj kvankam ĝi estas helpata per tri paĝoj da diversaj desegnoj, tamen multaj gravaj punktoj devas esti deciditaj per vorta priskribo.

Samtempe la priskribo de iu indivi-dua speco estas dissemita tra la tuta ŝlosilo, kio estas malhelpa kiam oni volas studi specon antaŭrikolte. Kompreneble la rimedoj de Esperantaj eldonejoj malofte povas subteni la koston de koloritaj bildoj, kies uzo en nacilingvaj libroj pri fungoj ege faciligas rekonon, sed almenaŭ la lingvo estu senkulpa. Sed la stilo de Simondetti preskaŭ nenie estas pozitive bona, kaj li tre strange uzas kelkajn vortojn (kies, nur, eĉ, la, sole, k.t.p.). Ekzemple, li diras "kies nur kelkaj specoj" por signifi "nur kelkaj kies specoj".

F. M. Dunn

BELARTO 2,* kultura kajero redaktita de W. Auld. Eldonis UEA, aŭtune 1961. Paĝoj: 68 + 4; formato: 26 × 21 cm.; prezo: por individuaj membroj de UEA, 12 st., por aliaj 14 st.

BELARTOn 2 apartigis disde BELARto 1 jam 3½ jaroj. Hodiaŭ tiu inerto venkintas: tiaforma la revuo ne plu eliros. Naskite el plispecifiĝo de "Revuo Esperanto", jam la unua kajero per sia malegaleco tamen misaŭguris. Similajn kritikojn motivas ambaŭ kajeroj. BELARTO 2 impresas ĝenerale senzorge kompilita, senorde aranĝita. Tio estas kulpo parte teknika (preseraro eĉ en titolo, manko de rutinaj informoj pri originala lingvo ĉe tradukoj), parte ankaŭ rezulta el granda diverseco de enhavo. Kia difino de "belarto" povas enpreni ekzemple de Setälä artikolon pri „Privilegia Vojo"? Aliaj eroj, kvankam teme validaj por tia eldonaĵo, tamen laŭ intelekta nivelo malakordas kun la cetero. Ni konsternite legas, ekzemple, ke por praloĝantoj de Saharo "la vivo estis eĉ malfacila. Oni suferis pro malsanoj." Aliloke J. H. Rosbach pri norvega literaturo verkante, ilustras neintence malfacilecon, eviti banalaĵojn en kritiko pri malgranda, neforta literaturo: "..... verkis bonegan romanon, treege interesan." Jen preskaŭ la nivelo de nia Esperanta kritiko.

Aliflanke, la nivelo de originalaĵoj estas nepre pli alta, ol ĉe BELARTO 1. Recenzo de Foote pri Esperanta Antologio, kvankam nebule rezonita, tamen elpikas multajn dormantajn ideojn. Malgraŭ tio laŭ persona takso plej valoras iuj tradukoj: el angla lingvo ("Neniam plu lundon", "Min la gepatroj gardis"), el rumana ("Malnova historio") kaj el japana ("Lojaleco"). "Konferanseo" (el bulgara) amuzos farsamantojn, sed ne ŝajnas meriti nomon de belarto.

Ĉe tiu prijuĝo impliciĝas kriterioj: kriterioj personaj. Belarto internacia tamen postulas kriteriojn internaciajn, kaj BELARTO 2 estas plia atesto pri nia — ankoraŭ malmulte sukcesa — lukto por establi tiajn supernacie validajn konceptojn. Denaske nia Esperanta kulturo posedas ĉiujn komune homajn, plus kelkajn indiĝenajn kaj aliajn elementojn, sed fronte al tradukoj el ĉiaj naciaj kulturoj oni certe bezonas ion plian. Se ni malalte ŝatas la menciitan bulgaran prozaĵon, do ĉu ĝi estas malŝatinda, aŭ, ĉu ĝian valoron maskas iaj al mi nekonataj konvencioj de bulgara literaturo? Legante iun el niaj diverslandaj antologioj, oni povas (kutime) fidi al kriterioj de ĝia redaktinto; sed kiel faru redaktanto de internacia revuo?

Unue, li povus postuli pli multajn subklarigojn por alikulturanoj. Tiurilate oni sentas klare eŭropan karakteron de BELARTO 2: ĉion japanan, ekzemple, oni notis kaj glosis — eĉ stelonomon (p. 47); sed la eŭrop-astrologioj aludoj de "Zodiako" (p. 11) restas tute sen komentoj.

Due, li povus pli akcenti nian originalan literaturon. Bonvene, BELARTOn anstataŭos nova revuo ĉefe originala. Sur tiu jam fekundigita kampo pli facile elkreskos kulturo interrasa, tamen unueca.

Victor Sadler

CED

Centro de Esploro

kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

Kiel menciite en la decembra numero de "Esperanto", CED renkontis kaj daŭre renkontas malfacilaĵojn en sia klopodo kompili kiel eble plej kompletan statistikon pri la lernejoj, en kiuj Espeperanto estas instruata. Relative kompleta statistiko aperis en la marta numero de "Esperanto" 1961. Ĝi montris, ke en 1959/60 la lingvo estis instruata en minimume 340 lernejoj en 27 landoĵ kun entute minimume 13.009 gelernantoj. Dum la kongreso en Harrogate evidentiĝis, ke pliaj lernejoj ne troviĝas en la listo. Laŭ la proksimuma takso, ilia nombro estis ĉ. 200. CED do entreprenis esploron kaj ricevis precizajn informojn pri pliaj lernejoj, kiuj ne estis menciitaj en la antaŭaj trarigardoj. La nombro de tiuj lernejoj estas: Belgujo 3, Britujo 1, Francujo 39, Pollando 84, Usono 4, entute 131, Sekve, supozante, ke Esperanto estis plue instruata en la menciitaj 340 lernejoj de 27 landoj, en la lerneja jaro 1961/62 la Internacia Lingvo estis instruata en 471 lernejoj de 27 landoj. Tiu ĉi cifero povas esti konsiderata kiel relative ĝusta, ĉar sendube ankaŭ aliaj lernejoj, kiuj ne respondis al la demandaro, instruis Esperanton, dum aliflanke, kredeble en kelkaj lernejoj, kiuj en la pasinta jaro havis Esperanton kiel lernobjekton, oni ĉesigis la instruadon en tiu ĉi jaro. CED komunikos la detalojn pri la menciitaj 131 lernejoj per aparta interna dokumento. Komence de la nova lerneja jaro ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en la pasintaj 3 lernejaj jaroj, ricevos apartan demandaron pri la stato en la lerneja jaro 1962/63, tiel ke la statistiko povu esti ĝisdatigita.

NOVAJ DOKUMENTOJ DE CED

Ekde la 1-a de januaro CED publikigis aron da dokumentoj, el kiuj 2 okaze de la 75-jara datreveno de la Internacia Lingvo. Antaŭ nelonge aperis la dokumento E/V/1 "Sciencaj, Teknikaj kaj aliaj Fakvortaroj en Esperanto", verkita de Dipl. Inĝ. R. Haferkorn. La 18-paĝa dokumento enhavas ankaŭ liston de la ĝis nun aperintaj terminaroj. La sama, iom kompletigita, dokumento estas nun tradukata en la anglan kaj en la francan, kaj baldaŭ ĝi aperos ankaŭ en tiuj du lingvoj. La alia grava dokumento estas la studo de W. Auld "Esperanto Kiel Literatura Lingvo", ĵus publikigita en la angla sub la signo D/I/3. La sama dokumento aperos ankaŭ en la franca. CED planas por tiu ĉi jaro kelkajn gravajn dokumentojn, inter kiuj unu pri la uzo de Esperanto en komerco.

MALLONGAJ INFORMOJ

Lic. Tibor Sekelj, kunlaboranto de CED kaj komitatano de UEA, nun gvidas la "Karavanon de Amikeco" tra Afriko. La Karavano troviĝis fine de majo en Adis Ababa, Etiopio. La Karavano, kiu konsistas el diversnacianoj, uzas Esperanton kiel la solan oficialan lingvon. Dum sia vojaĝo ĝi disvastigas informojn pri la Internacia Lingvo. Lic T. Sekelj publikigos en "Esperanto" artikolon pri siaj spertoj.

D-ro A. Albault, kiu transprenis en CED la fakon "Interlingvistiko" (pli frue pri ĝi okupiĝis la forpasinta D-ro M. Wajsblum), verkis tre bone argumentitan "Publikan Leteron" al s-ro P. Burney, Profesoro de la Franca Instituto okaze de la publikigo de lia libro "La Internaciaj Lingvoj" (vidu la ĉefartikolon). La letero aperos en la franca lingvo en "Franca Esperantisto".

Prof. D-ro Ivo Iapenna, la Direktoro de CED, prelegis, post la kongreso en Harrogate, en Wokingham al la kongreso de TEJO; en Danlando dum 8 tagoj al geinstruistoj kaj gelernantoj de porinstruistaj seminarioj (septembro 1961); en la Kvina Internacia Seminario de GEJ en Köln de la 27-a de decembro ĝis la 2-a de januaro; en la semajnfina renkontiĝo de J. E. B. en Oxford la 3-an kaj 4-an de februaro; en Kopenhago al kunveno de ĉiuj kopenhagaj E. grupoj meze de aprilo; al kunveno Esperantista de Jorkŝiro en York la 19-an kaj 20-an de majo; al la Beneluksa Kongreso en Hago la 9-an kaj 10-an de junio, al du porinstruistaj seminarioj en Rotterdam kaj Haarlem, kaj al kunveno de geinstruistoj en Hago la 15an de junio.

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
La stato je la 27-a de februaro 1962 . . .	22	15	6
S-ro Courtis, Francujo		4	0
Prof. G. Waringhien, Francujo		14	6
S-ro E. F. Dean, Britujo	1	0	0
S-ro Paul Ciliga, Francujo	1	10	0
S-ro D. B. Gregor, Britujo	1	0	0
S-ro Benj. Reich, Usono	1	15	10
S-ro Luigi Minnaja, Italujo	5	0	0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	5
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	5
S-ro Algot Blid, Svedujo		19	11
S-ro August Wetterstein, Germanujo		18	4
S-ro H. Bakker, Nederlando	5	0	0
S-ro E. Carlen, Svedujo	3	18	5
S-ro R. Bossing, Nederlando		19	10
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	5
S-ro Nassif Isaac, Kuwait	2	0	0
S-ro I. Kreunioch, Aŭstralio		7	2
S-ro H. Künzel, Germanujo		11	0
H. B. A. Nederlando	10	0	0
S-ro J. Kosutek, Aŭstralio		17	10
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando		10	5
S-ro Petro Nuez, Hispanujo		1	0
S-ro D-ro A. Albault, Francujo	3	10	0
S-ro Guillaume, Francujo	1	0	0
Unuiĝo Esperantista Franca, Francujo	3	13	0
Kolektita dum kunveno de la Jorkŝira Federacio, Britujo	7	0	0

S-ro J. E. Sykes, Britujo	1- 0- 0
N. N. Sakramento, Kalifornia, Usono	1- 1- 3
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	10- 5
S-ro P. Williams, Novzelando	5- 0
Harvard Combined Charities, Usono	1- 1- 6
S-ro K. Gustavsen, Norvegujo	13-14- 6
S-ro E. F. Dean, Britujo	2- 0- 0
Gesinjoroj Laurie, Britujo	1- 0- 0
La stato je la 6-a de junio 1962	97-10- 8

CED tutkore dankas al ĉiuj, kiuj subtenas finance ĝia laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de UEA, ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la oficejo de CED je la nomo de ĝia Direktoro.

Belarta Konkurso 1961
Branĉo Kongreslanda
Unua Premio

Memoremo

Emily Brontë

Sub tero vi, sub neĝamasoj — fore,
fore, sen varmo, en mizera tombo!
Ĉu mi ne amas, kara, vin memore,
kiun forrabis ĉion-raba Tempo?

Ĉu miaj pensoj solaj ne ankoraŭ
sur montoj ŝvebas, apud nordaj maroj,
haltante, kie tiu nobla koro
erikon portas por eternaj jaroj?

Sub tero vi; dek kvin decembroj ŝtormaj
el tiuj brunaj montoj jam degelis:
post jaroj tiom akraj kaj reformaj,
kiu memoras, tiu ja fidelis!

Pardonu, Amo, se mi vin ignoras:
sur tajdo de la mondo drivas mi, kaj
deziroj, celoj novaj nun valoras —
sed ne perfidaj, kvankam forgesigaj.

Nenian novan tagon mi ekkonis,
nek sur ĉielo ian reheliĝon;
feliĉon jam nur via vivo donis;
la tombo prenis vin — kaj la feliĉon.

Sed kiam fuĝis for la tempo ora,
kaj tamen Malespero ne detruis,
mi lernis la ekziston gardi flora,
fortigi, nutri ĝin — sed jam ne ĝuis.

La vane brulajn larmojn nun mi digis,
rifuzis al la koro plu avidi
la vian, kaj ĝin firme rezignigis,
en sian pretan tombon jam rapidi.

Kaj tamen ĝin indulgi mi ankoraŭ
timas; se per dolorekstaza sondo
mi trinkus tiun vinon de angoro,
kiel mi frontus al dezerta mondo?

El la angla trad. Victor Sadler

Pri Radiodisaŭdigoj

En la esperantista gazetaro oni ofte publikigas tabelon de la radiostacioj, kiuj elsendas en esperanto. Preskaŭ ĉiam je la piedoj de la tabelo estas instigaj frazoj al la legantoj, ke post aŭskultado oni nepre skribu leterojn al la koncerna radiostacio.

Vere estas, ke ofte la gvidantoj de radiostacioj decidas enkonduki, pligrandigi aŭ forigi iajn disaŭdigojn, depende de la intereso de la aŭskultantaro esprimita en iliaj leteroj. Ekzemple dank' al la provokita kampanjo en la esperantista gazetaro antaŭ kelkaj jaroj, rezulto de kio estis bombardo de radio Sofia per leteroj el eksterlando, oni decidis restarigi la esperanto-dissendojn.

La esperantistoj ofte skribas leterojn al la radiostacioj, sed iuj el la senditaj leteroj anstataŭ helpi nian aferon — malhelpas.

Skribante al radiostacioj ni devas konsideri jenon:

1. Ĝeneralaj vortoj efikas pli malbone ol konkretaj. Krom pri la aŭdebleco de la elsendoj oni menciu ion pri la aŭskultita programo. Tio konvinkas leganton de via letero, ke vere vi aŭskultas la elsendojn.

2. Se la letero estas subskribita de kelkaj personoj ĝia valoro en la okuloj de la elsendarangantoj multe pligrandiĝas.

3. Ĉiam ni devas memori, ke per elsendoj en esperanto oni ne celas disvastigon de nia lingvo, sed aliajn aferojn. Pro tio bondeziroj pri pli grandaj sukcesoj en la disvastigo de la internacia lingvo — nia kara esperanto ktp — efikas malbone.

4. Iuj esperantistoj forgesas, ke la esperantistaj disaŭdigoj ne estas parto de nia movado kaj estas ege mirigitaj, ke ili ne estas neŭtralaj. Postulo de tio en letero ridigas nin en la okuloj de la radiostaciaj ĉefoj.

5. Antaŭnelonge en radio Sofia estis ricevita letero de esperantistino el eksterlando. Ĝia enhavo estis religiema tiomgrade, ke ĝi certe ŝokus ankaŭ ĉefon de radiostacio en kapitalista lando, kie la eklezio ne estas apartigita de la ŝtato. Pro tio ni ne devas miri, ke iuj gvidantoj de esperanto-radioelsendoj, kiuj ne estas esperantistoj, opinias, ke en nia movado estas multe da stranguloj, kiuj krom al esperanto ne havas intereson al aliaj gravaj problemoj, ke ili estas indiferentaj eĉ al la alternativo, ĉu paco aŭ milito estu sur la tero.

Nik Nikolov

LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.

NOVAĴOJ DE LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN YSTAD

La IJK de TEJO ĉi-tiun jaron ekhavos propran poŝtstampon, kiu montros la tipan Ystada-n kornbloviston. Krome estos legeblaj la vortoj "18-a IJK 12.8.62, YSTAD, ESPERANTO". La stampo estos uzata de la 12-a ĝis la 18-a de aŭgusto kaj leteroj de la unua tago estos aĉeteblaj po du respondkuponoj (internaciaj) por unu letero. Leteroj de la aliaj tagoj estos aĉeteblaj po unu respondkupono por unu letero. Sed tuj mendu leterojn de la unua tago ĉar la nombro estos ege limigita !

La tuta programo baldaŭ estos preta kaj inter la programeroj ni trovas interesan tuttagan ekskurson, prelegon de H. Yagi el Japanujo kaj multajn aliajn interesaĵojn kaj amuzaĵojn en belega turista hotelo-restoracio sur la arbara bordo de Sudsvedujo.

Pro miskomprenoj ni akcentas ke la kongreskotizo kompreneble enkalkulas ĉiujn programerojn, loĝadon, manĝadon kaj la vojaĝon de Malmö al Ystad. La kotizoj post la 1-a de majo estas por personoj malpli ol 20-jaraj 165 kronoj, 20-25-jaraj 175 kronoj kaj pli ol 25-jaraj 230 kronoj. TEJO-funkciuloj 25-30-jaraj pagos la saman kotizon kiel TEJO-anoj 20-25-jaraj. Aliĝilon vi ricevas de **Internacia Junulara Kongreso, Ystad, Svedujo. Bankkonto** estas **81208 ĉe Sparbanken i Ystad, Svedujo.** TUJ ALIĜU AL INTERESEGA ARANĜO EN SVEDUJO.

INTERNACIA T.E.J.O.-SKIFERIO 1962/63 ree en FIZMOOS, AŬSTRUJO

Represo petata !

Kontraŭe al nia lasta informo ni sciigas, ke la 8-a skiferio de TEJO kaj la 6-aj skikonkursoj de TEJO okazos de la 26. de Decembro ĝis la 6-a de Januaro ne en Saalbach sed ree en **Filzmoos.** Estas rezervitaj du domoj, nome "Reithof" kaj "Weitenhaus". La prezo po persono kaj tago estas en Reithof 65.— aŭstr. ŝil., en Weitenhaus 55.— ŝil. Aliĝoj nur povas esti akceptataj por la tuta tempo (11 tagoj). Kiu tamen deziras resti malplilonge, devos pagi por ĉiu mankanta tago 25.— ŝil. Pro organizaj kaŭzoj la aliĝo nur povas validi, se samtempe estas sendata antaŭpago de 300.— aŭstr. ŝil. al s-ro Heinrich Reiter, WIEN X., Van der Nüllgasse 100/10/15, Aŭstrio. Geamikoj, skiemuloj, feriemuloj, amuziĝemuloj : Jam nun preparu vin por partopreno al la plej internacia kaj refreŝiga esperantista vintroaranĝo en rave bela sonĝopejzaĝo. Invitataj ankaŭ estas viaj ankoraŭ-neesperantistaj geamikoj. Tiamaniere ni volas helpi en la varbado por Esperanto.

Vi helpos la organizanton se vi aliĝos jam nun.

Kore Via
Heinrich Reiter





(supre) "Reithof"
(sube) Dum ekskurso en Filzmoos.

GRAVA PERDO POR TEJO

Kun granda kortuŝo ni devas vin informi pri la mortakcidento de nia amiko **Kerrin MASTERMAN,** nova sekretario de la Junulara Esperantista Brita. Veturante hejmen al **Gerrards Cross,** Grit Howe, South Park (Bucks.) en sia aŭtomobilo li perdis la vivon post kolizio kun alia aŭtomobilo. La kunveturintoj, t.e. lia fianĉino, ties patrino kaj la prezidanto de JEB, estis grave vunditaj.

Al la postrestintoj de Kerrin ni esprimas nian profundan kondolencon !

JARKUNVENO DE LA JUNULARO ESPERANTISTA BRITA

La jarkunveno de JEB okazis sabate la 21-an de Aprilo en la marborda urbo Southport, Lancashire. Estas elektitaj nova komitato kaj novaj funkciuloj. Prezidanto elektiĝis Humphrey TONKIN. Eksterlandaj geamikoj kiuj volas rilati al JEB skribas al **John Hill,** 17, Bander Grove, LEEDS 9, Yorks.

INTERURBA JUNULARRENKONTO EN AŬSTRIO

Je la semajnfino 19./20. de Majo sin renkontis en Linz/Danubio la esperantistaj junulargrupoj de Linz kaj Wien. Estis bonege sukcesinta aranĝo, duoble grava, ĉar la junulara grupo en Linz estis fondita dum tiu-ĉi renkonto. La Linza estas nun la dua TEJO-grupo en Aŭstrujo kaj ni esperas, baldaŭ fondi TEJO-grupojn ankaŭ en Pottschach — Ternitz, N.Ö., kaj en Knittelfeld (Stmk.), kie ankaŭ — kiel en Linz — troviĝas tre agemaj porjunularaj samideanoj-aktivistoj !

La bildo montras la gepartoprenintojn de Esperantokurso, en Linz. Ni gratulas al niaj samideanoj Schulrat Mraz, J. Geroldinger kaj M. Hollinger.

H. R.



TABELA TRARIGARDO PRI LA INFORMA LABORO EN 1961

Landa Asocio aŭ teritorio	Adreso de la Informa Fako aŭ kunlaboranto	Nombro de		Prelegoj		Radio prelegoj	Ekspozicioj		Distrib. afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Ĉu la interesiĝo pri Esperanto kreskis?
		artikoloj	informoj	nombro	ĉeestintoj		nombro	ĉeestintoj		
Aŭstralia	Ruth McGrath, 41 Reynolds Rd. Mt. Pleasant	22	17	14	650	10	2	500	360	Supozeble kreskas
Aŭstria	Gazetara Servo de AEF, Fünfhaus gasse 16—18, Wien, XV	120	300	10	?	55	1	400	7.000	Kreskis
Argentina	Horacio Ciafardini, Alem, 1054-6°piso Rosario	8	17	1	50	?	1	?	?	Sama
Belga	Ned.: G. Maertens, Prins Leopoldstr. 51, Brugge **Fr.:** Grafo de Cuyper, Rue du Temple 44, Courcelles (Hainaut)	5	25	3	300	4	3	1.000	600	Sama
Brazila	Prof. Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim 27-ap. 61, Rio de Janeiro	1.100	2.500	190	16.000	280	20	48.000	30	Sama
Brita	BEA, 140 Holland Park Avenue, London, W 11	25	750	100	4.000	10	2	2.000	15.000	Kreskis rimarkeble
Bulgara	Krastju Karucin Sofia, Hristo Botev 102	40	40	45	5.500	5	34	7.000	15.000	Kreskis
Ĉeĥoslovaka	Ĉeĥoslovaka E. Komitato	16	30	22	2.000	5	7	10.000	16.000	Kreskis
Dana	Sven Ziegler, Jølbyvej 9 B, København, Vanløse	120	330	11	2.240	3	—	—	1.000	Sama
Finnlanda	Vilho Setälä, Esperantotie 4, Irislahti	60	80	3	400	1	—	—	500	Kreskis
Franca	UEF, 34 rue de Chabrol, Paris 10.	770	800	212	3.700	61	23	13.000	36.000	Kreskis
Germana	Bernhard Zenker 645 Hanau, Ramsaystr. 15	550	1.110	45	1.300	28	40	4.200	175.000	Kreskis
Hinda	Informis S-ino M. Haudebine	1	6	6	600	—	1	150	2.000	Kreskis
Hispana	Salvador Aragay Galbany, Arce 8-2-4a, Cornella Barcelona	70	40	14	2.500	40	1	500	2.500	Sama
Hungara	HEA, PF. 147, Budapest 4.	350	80	50	3.000	8	80	5.000	5.000	Konstante kreskas
Islanda	Baldur Ragnarsson, Alfhólsvegur 42, Kopavogur	2	30	—	—	52	—	—	—	Iom kreskis
Itala	Informa Oficejo de IEF (R. Pennazio) Caselpost 248, Torino	400	800	92	6.100	44	23	75.000	84.000	Kreskis
Kanada	R. Eichholz, Esperanto Press, Oakville, Ontario	20	20	2	140	4	—	—	1.200	Ege kreskis
Madagaskara	H. Rousseau, B. P. 730, Tananarive	5	—	3	200	8	—	—	50	Sama
Monaka	J. J. Derks, 6bis Bd. d'Italie, Monte Carlo	—	25	—	—	1	—	—	50	Kreskis
Nederlanda	H. M. Schippers, van Humboldtstr. 42 bis, Utrecht	80	100	6	150	14	4	300	2.500	Iom kreskis
Norvega	IF de NEL, L. Anjer, Boks 942, Oslo	45	860	11	500	1	1	1.000	25.000	Iom kreskis
Novzelanda	B. M. Harvey, 21 Stoke St. Newtown, Wellington, S1	18	270	16	200	3	1	?	14.000	Kreskis
Pollanda	Jerzy Uspieński, Warzawa, ul. Gałczyńskiego 10-7	250	900	30	7.000	100	6	6.000	20.000	Kreskis
Sveda	Jan Strönne, Amiralsgatan 36, Malmö	310	700	230	14.500	1	4	163.000	21.500	Kreskis
Svisa	D-ro A. Baur, Hangweg 57, Liebefeld	65	60	6	500	5	3	500	4.000	Sama
Sudafrika	E. W. Woodruff, P. O. Box 3293, Johannesburg	5	2	—	—	—	1	1.700	—	Sama
Urugvaja	R. A. Barbieri, Rio Branco 1556, Ap. 601, Montevideo	10	10	2	100	50	1	?	500	Sama
Respondoj	ENTUTE 28	4.476	9.902	1.124	71.630	791	259	339.250	448.190	Kreskis
30 respondoj	Komparaj ciferoj por la jaro 1960	4.301	9.269	1.361	93.980	669	288	421.550	313.050	Kreskis

RIMARKOJ PRI LA INFORMADO EN 1961

1. La Tabela Trarigardo pri la Informa Laboro en 1961 estas kunmetita surbaze de la informoj, kiujn la I.F. de UEA ricevis de la landaj asocioj, aŭ landaj Informaj Fakoj, aŭ rektaj kunlaborantoj de la I.F. de UEA. Malgraŭ la insistaj petoj, ke absolute ĉiuj respondu, tiel ke la trarigardo estu kiel eble plej kompleta, tamen el pluraj landoj venis nek la petitaj informoj, nek iu ajn vivosigno. Estas precipe bedaŭrinde, ke el Jugoslavio, Usono kaj Soveta Unio ne venis informoj. Ĝis antaŭ nelonge la Jugoslavia I.F. estis unu el la plej bonaj, sed ĉijare ĝi tute ne reagis je pluraj petoj. Ĉina Esperanto-Ligo sciigis, ke ĝi ankoraŭ ne starigis Informan Fakon kaj tial mankas al ĝi la elementoj por doni respondojn. Pro tiu nelivero de informoj al la I.F. de UEA la Trarigardo estas bedaŭrinde nekompleta. La publikigitaj ciferoj devas tial esti konsiderataj kiel minimumaj.

2. El la respondoj al la Demandaro sekvas, ke multaj landaj asocioj ankoraŭ ne organizis apartan Informan Fakon. Tial la informa laboro necese devas esti multrilate manka. Verajn Informajn Fakojn havas nur la Argentina, Belga, Brazila, Bulgara, Dana, Finna, Franca, Germana, Itala, Kanada, Nederlanda, Norvega, Novzelanda, Pola, Sveda, Svisa kaj Urugvaja L.A. La Itala I.F. plue restas unu el la plej modele laborantaj. Grandegan progreson faris la Franca I.F., kiun prizorgas 8 personoj kaj kiu en la lasta jaro atingis rimarkindajn rezultojn. Elstare bonaj estas ankaŭ la Brazila, Dana, Germana, Norvega, Pola, Sveda I.F. Ĉiuj, kiuj iel kontribuis al korekta informado pri la Internacia Lingvo, meritas gratulon pro tiu malfacila laboro.

3. Pri la unuopaj brancoj de agado sur la kampo de informado estas necese doni jenajn klarigojn: En la kolumnoj *"artikoloj"* kaj *informoj"* estas enkalkulitaj ankaŭ la artikoloj kaj informoj malfavoraj al Esperanto. Ilia nombro estas tre malgranda. En la plimulto de la respondoj oni akcentas, ke aperis neniu artikolo aŭ informo kontraŭ Esperanto. En Britujo el 25 artikoloj, 5 estis malfavoraj; en Ĉeĥoslovakio el 16 artikoloj, 3 malfavoraj; en Danlando el 120 artikoloj, 3 malfavoraj; en Francujo el 770 artikoloj, 2 estis malfavoraj; en Germanujo 4 malfavoraj; en Italujo el ĉiuj artikoloj kaj informoj, nur 7 estis malfavoraj . . . . . Efektive, laŭ la ricevitaj informoj ne pli ol 1% de ĉiuj artikoloj kaj informoj estis malfavoraj. En la nombro de *prelegoj* estas enkalkulitaj nur la nacilingvaj prelegoj pri la Internacia Lingvo. La samo validas por la *radioprelegoj*. Kompreneble, ankaŭ la Esperantlingvaj radioprelegoj kaj la informoj pri tiuj prelegoj en la radioprogramoj kontribuas, eĉ konsiderinde, al disvastigo de la Internacia Lingvo, sed tio ne estas enkalkulita. En la kolumno *"ekspozicioj"* estas elkalkulitaj nur publikaj ekspozicioj. En la plimulto de la kazoj la nombro de la vizitintoj estas nur proksimuma.
Fine, la rubriko *"afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj"* entenas diversspecajn presaĵojn kun informoj pri Esperanto, inkluzive la 6-lingvan flugfolion de UEA kaj la flugfolion por universitataj medioj. Se oni komparas la rezultojn por 1961 kun tiuj de 1960, oni facile rimarkos ke la agado en iuj brancoj estis iom pli intensa en 1961, dum en la aliaj ĝi estis iom pli forta en 1960. Ĝenerale la informado restis sur la sama nivelo kaj la rezultoj povas esti konsiderataj kiel kontentigaj. Tio neniel signifas, ke oni ne povus atingi ankoraŭ pli kontentigajn rezultojn en la estonteco. En la plenumo de la nova Laborplano de UEA la landaj I.F. kaj ĉiuj personoj helpantaj sur la kampo de informado havos tre respondecan taskon.

4. Pluraj landaj I.F. aplikis ankaŭ aliajn metodojn de informado. En Aŭstralio, Britujo kaj verŝajne en aliaj landoj aperis pagitaj reklamoj kaj anoncoj en la gazetoj. En Belgujo infanĥoro kantis Esperantlingve en la radio. En Brazilo estis kinoprezentadoj kaj programoj en la televido. En Finnlando, Italujo kaj aliaj landoj oni havis specialajn kontaktojn kun sciencistoj. En pluraj landoj, inter kiuj en Italujo kaj Francujo, oni utiligis inaŭgurojn de stratoj aŭ placoj je la nomoj de Zamenhof aŭ Esperanto por informado pri la lingvo. En Germanujo oni aplikis, interalie, jenajn metodojn: montrovitrinoj, transdono de gazetinformiloj al aŭtoritatoj, adresoj de la organizaĵoj en telefonlibroj, leteroj al lernejestroj, lumbildaj vesperoj, donacoj de Esperantaj libroj al bibliotekoj, disponigo de Esperantaj gazetoj al legoĉambroj de urbaj bibliotekoj, prezento de sonbendoj, kontaktoj kun neesperantistaj junularaj asocioj. En Islando kaj supozeble en aliaj landoj aperis literaturaĵoj tradukitaj el Esperanto. En Italujo oni dediĉis apartan atenton al eldonado de faldfolioj kaj broŝuretoj fare de turismaj entreprenoj, al pluraj hoteloj oni donis la nomon "Esperanto".
En Nederlando oni sendis fakan Esperantlingvan literaturon al diversaj fakaj instancoj; en la libro pri grandaj personoj de la monda historio, kiun verkis M. Dekker, troviĝas ĉapitro pri D-ro L. L. Zamenhof. En Norvegujo, Svedujo kaj Kanado aperis nacilingvaj eldonoj de la landaj organoj kun artikoloj kaj diversaj informoj pri Esperanto. Tiaj kaj similaj agadoj estas imitindaj en aliaj landoj.

5. Necesas aldoni, ke la I.F. de UEA faris sian eblon por helpi la landajn asociojn kaj iliajn I.F. per livero de diversaj materialoj, konsiloj, instigoj, organizo de kampanjoj. Pri la agado de la I.F. de UEA vidu la Ĉap. VIII Informado en la Estrara Raporto por la jaro 1961/62.

I.L.

AL LA U.K.-KONGRESANOJ!

La poŝtmarkkolektado por UEA daŭre funkcias. Se vi per donaco deziras kontribui, la plej utila maniero estas kunporti neuzitajn (poŝtfreŝajn) kompletajn seriojn de via lando. Ofte tiaj estas vendeblaj por pli ol la nominala valoro. Akceptas daŭre Peter Zacho, Randbølvej 4, Kopenhago F, Danlando.


GRANDA BELGA BIERFAREJO UZAS ESPERANTON

La Komuna Merkato plioftigos la internaciajn kontaktojn. Ĉiuj antaŭvidemaj entreprenoj preparas sin kaj tiel ankaŭ la plej granda bierfarejo de Valonlando. Ĝia situo en la tridiverslingva parto de Belgujo, en la tuja apudeco de Germanujo kaj Nederlando, kontribuos ankoraŭ pli al tiu kontakto.

Gvidataj vizitoj kaj senpaga gustumado de la produktoj estos organizataj ek de la 15 a de Majo. Konscia pri la diverslingveco de la vizitontoj, la Direkcio de la bierfarejo konsekvence akceptis ankaŭ Esperanton apud la aliaj lingvoj parolataj en la landoj de la Komuna Merkato Ĝi tiucele dungis Esperantiston kiel interpretiston, kiu ekskluzive gvidos la vizitontojn.

Gvidataj vizitoj en Esperanto estos eblaj ĉiutage (escepte lundon antaŭtagmeze, sabate kaj dimanĉe) je la 9 a aŭ la 14 a horo, por grupoj de 10 ĝis 40 personoj. Unuopaj eksterlandanoj estas tamen bonvenaj. Por ili oni faros specialan aranĝon.

Interesatoj por viziti la bierfarejon skribu al: Chef du Département "Public Relations", Brasserie Piedboeuf, Jupille (Liége), Belgujo, por peti la viziton kaj fiksi la daton. Nepre indiku la nombron de la vizitontoj. Ne skribu dankleterojn sed nur skribu kiam temas pri vizitdemando aŭ koncernaj informoj.



Solvon de la krucvortenigmo aperinta en la junia numero.

NIA FORUMO

Familio Martinez

En "Esperanto" numero 665 (4) por 1961 estis presita la anonco sub titolo "Morala alvoko" en kiu sinjoro Pablo Martinez sciigis, ke liaj tri gefiloj, evakuitaj en Ruslandon komence de 1939, ne donas la signojn de l'vivo al sia patro. Pro tio li petis samideanan monhelpon.

Mi informiĝis en centra oficejo de Soveta Ruĝa Kruco kaj nun povas sciigi, ke :

Martinez Roberto, naskita en 1932 en 1959 estis lernanto de metilernejo numero 26 en urbo Taldom, Moskva regiono;

Martinez Karminjo, naskita en 1930, en la sama jaro loĝis en Moskvo, ulica Gonĉarova, 15 kv. 57.;

Martinez Pablo, naskita en 1928, estis loĝanta en urbo Klin, Moskva regiono. Antaŭ kelkaj jaroj li vojaĝis Hispanujon, sed revenis Sovetunion.

Sinjoro Pablo Martinez, la patro, en 1959 informiĝis pri siaj gefiloj en Soveta Ruĝa Kruco kaj la informaĵo de la oficejoj estis al li sendita laŭ lia adreso. Eble li ne ricevis la informon, eble li ricevis post kiam li donis la anonceton, eble li nun jam havas la sciigon de siaj gefiloj, mi ne scias.

Tamen mi estas feliĉa informi, ke liaj gefiloj estas vivantaj kaj sanaj. Li povas sendi al ili la leteron laŭ supredonitaj adresoj.

Ĉar la anonco en la revuo povas elvoki erarajn opiniojn pri la sorto de evakuitaj infanoj en Sovetunion, mi petas la redakcion presigi mian leteron en la revuo.

A. S. Nikitin

Ĉu ekzistas ie ajn en la mondo — eble en Aŭstrio, Ameriko, U.S.S.R. aŭ alie — familianoj ROSENSTOCK (eble sub devige ŝanĝita dummilite nomo), devenantaj de Krakovo, ekz. Leono (Napoleono), Stanislav, Jozefo, Alfredo aŭ alia fratino — (ŝia edziĝnomo ne konata) —. Se jes, ili bonvolu doni sian adreson al s-no Stanislav Rudnicki, Warszawa, ul. Niska Nr. 14/27, kunaranĝinto de "Napoleono" de VII. Universala Kongreso.

Delegitoj de UEA estas insiste petataj publikigi tiun ĉi demandon en loka gazetaro.

Tra la Mondo

TRA LA MONDO

Aŭstrujo

● **Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista** okazigos sian unuan Renkontiĝon de la 15a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1962 sur Hafner-laga Lumtereno, Karintio (Aŭstrujo). Ĉar ĉiuj domoj de l'ĉirkaŭaĵo jam estas forluitaj, oni prefere tendumu. Adreso de la terposedanto : Christian Antonitdch, Hafnerhof, Post Keutschach, Karintio, Aŭstrujo.

Belgujo

● **La 5a Internacia Turista Koncentrado de Fervojistoj** okazis en Trois-Ponts kaj Lieĝo de la 4a ĝis la 10a de junio, sub la Honora Protektado de S-ro Bertrand, Ministro de la Trafiko de Belgujo.

Ĉinujo

● **Grava E-ekspozicio en Ĉinio.** Por veki pli grandan intereson pri Esperanto kaj akiri pli vastan aplikadon de nia lingvo en Ĉinio, la Ĉina Esperanto-Ligo aranĝos imponan E-ekspozicion en decembro de la kuranta jaro. Krom diversajn novajn esperantaĵojn ĝi bezonas precipe materialojn pri utiligado, cirkulado de "El Popola Ĉinio" kaj aliaj ĝiaj eldonaĵoj. Deziratai estas gazetoj kaj ĵurnaloj sur kiuj aperis tradukoj, represoj el "El Popola Ĉinio" kaj aliaj eldonaĵoj de ĈEL, fotoj montrantaj legadon, ekspozicion aŭ prelegon pri aŭ laŭ materialoj de la supre diritaj gazetoj kaj libroj, kaj eĉ simplaj informoj pri tiaj utiligado kaj cirkulado. Ĉiujn materialojn por la ekspozicio oni sendu antaŭ la fino de septembro al la redakcio de El Popola Ĉinio (P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio), kaj notu sur la koverto "Por Ekspozicio". Rekompence la sendintoj ricevos belan memoraĵon de la ekspozicio.

Ĉiuj ja scias, ke sukceso de Esperanto en la Oriento multe signifas por triumfo de E-movado. Do helpu aktive al la fruktodona okazigo de tiu ĉi ekspozicio.

Francujo

● **Unua markola kongreso** sukcese kunvenigis en Bulonjo-apud-maro delegitojn kaj aktivulojn el ses landoj. Elstaraj partoj de la dutaga programo estis laborkunsido, prediko de sacerdoto Warot, oficiala akcepto, varieta vespero kun la ventroparolanto Ben Weber, el Middelburg, trafa festparolado, kaj depono de florkrono ĉe Placo Zamenhof. Danke la sindonemajn organizintojn, pli ol cent partoprenintoj amike preparis la venontajn renkontiĝojn ĉe marbordaj urboj de Britujo kaj Belgujo.

● **Kvin poemoj** nacilingvaj de S-ro G L. GILMAN, iama delegito en Roubaix, estis premiitaj ĉe akademioj de Avinjono kaj Tunizo.

o **En Tourcoing,** la klubo partoprenis la akcepton de junulara grupo el Rheydt (Germanujo). Inter la gastoj, estis du studentoj el Pakistano.

● **Plej multaj Francaj periodaĵoj** amplekse reklamadas pri la kursoj de firmao, kiu celas instrui per diskoj esperanton kaj 34 aliajn lingvojn. Demonstraciajn lecionojn oni povas ricevi senpage ĉe la informejo de 4 gravaj urboj.

● **Venonta konkurso** de NordFranca E-federacio temos pri traduko de turisma faldfolio pri la urbo Valenciennes.

● **Ĉe la "subtena kampanjo"** de U.E.F., S-ro Lefèvre gajnis unusemajnan restadon en Kopenhago. Aliaj premioj : n-roj 537, 538, 550, 979, 1091, 1220, 2334, 2638, 2830, 3258, 687.

● **Sub la patroneco de S-ro. Ministro de la Nacia Instruado.** De la 16a ĝis la 20a de Aprilo 1962 en Grésillon (Francujo) okazis Esperantista Kultura Semajno. Organizita de "U.E.F.", sub la patroneco de la Ministerio de la Nacia Instruado, la Esperantista Kultura Semajno akiris grandan sukceson.

24 gelernantoj de la Porinstruistaj Seminarioj de la regionoj de : Aix-en-Provence, Arras, Avignon, Bourges, Saen, Marseille, Nevers et Perpignan, profitis stipendion koncerne la vojaĝon kaj gastadon en "Grésillon", por partopreni la Kulturan Semajnon.

Alveninte jam de la sabato 14a de aprilo, vespere, en la kastelo "Grésillon", la prirespondeculo de la Semajno, nia Prezidanto S-ro. René

LLECH-WALTER, grupigis la dimanĉon, matene, ĉiujn provatojn, por la laborkunsido.

Oni organizis interparolad-kunsidojn, kaj, jam de la unuaj tagoj, dank' al la ĉeestado de alilandaj gesamideanoj, oni sukcesis starigi fruktodonajn kontaktojn.

La prelegojn en Esperanto regule sekvis, ne nur la gestudantoj kiuj profitis la stipendion, sed ankaŭ 80 provatoj enskribitaj.

Prelegis laŭvice : S-ro R. WATIER (La Kastelo "Grésillon") Kulturdomo de la Francaj Gesamideanoj) S-ro GOUGET (Tendumado kaj Turismo eksterlande, dank'al Esperanto). S-ro René LLECHWALTER (Turismaj aspektoj de Roussillon — kun diapozitivoj-). S-ro BABIN (Edukado kaj Toleremo) — S-ro J. A. ROUSSEAU (Esperanto kaj Poŝtadministracio — kun ekspozicio de poŝtaj kaj filatelaj dokumentoj) — S-ino B. CHEVERRY (Historio de Anjou-Anĵu kun diapozitivoj) — S-ro LLECH-WALTER (La Ekspozicio de LENTAIGNE-CAPUS, kaj, Turismaj Aspektoj de Andoro) — S-ro CILIGA (Impresoj pri Hispanujo 1961). S-ro FRANGEUL (Ekonomisistemo de Anjou) — S-ro MABESOONE, Doktoro pri Scienca Fako en Amsterdam (Batalo de la Nederlandanoj kontraŭ la Maron — kun diapozitivoj). S-ro RAJSKI (de Varsovio). (Estinta kaj Nuntempa POLLANDO — kun filmo) — S-ro PETIT (Krozado sur la Nigra Maro- kun diverskolora filmo) — Doktoro ALBAULT (de Hipokrato ĝis la Moderna Medicino). S-ro J. THIERRY (Ĉu eble traduki Kanzonojn ?) — S-ro ROUGETET (Nivelo de la Familia Vivo). — S-ro J. GUILLAUME (Aŭstralio — kun filmo). —

La Kultura Semajno finiĝis la Sabaton 21-an de aprilo per ekzameno en kiu partoprenis la gelernantoj de la Porinstruistaj Seminarioj kiuj profitis la Herzog-stipendion.

Sekve al tiu ekzameno, la ekzamenantaro konsistanta el dek du profesoroj, inter kiuj tri alilandanoj : S-ro RAJSKI (Pollando) — S-ro MABESOONE (Nederlando) F-ino OVINGTON (Britujo) elektis kvin gekandidatojn kiuj povos ĉeesti la "Internacian Elpruvadon" en Romo, de la 15-a ĝis la 21-a de julio 1962.

Tiuj Gekandidatoj estas :

F-inoj : Christiane GARRIGUE (de Marseille), Marie Thérèse JUCHA ULT (de Rochefort-sur-Mer), Jacqueline DESTOUCHES (de Marseille), S-roj : Jean-Pierre BOURGOIN (de Nevers), Nestor CARDONA (de Perpignan).

Germanujo

● **Speciala poŝtstampo en Oberkirch.** Okaze de la 40a Germana Esperanto-Kongreso dum pentekosto la poŝtoficejo en Oberkirch (Baden) uzis specialan stampilon. La kune montritan stampon surhavis la poŝtaĵoj dum tute semajno, nome de la 9a — 16a de junio 1962.

● **Feria kurso en hejmo de la kultministerio.** En la urbo Rinteln, universitata urbo de la mezepoko, enmeze de la bela Wesermontaro, okazos 25an de septembro — 5an de oktobro feria semajno por geinstruistoj kaj aliaj interesuloj. La kunvenejo estas hejmo de la kultministerio de la lando Niedersachsen, parto de la germana federacio. En tiu hejmo la kultministerio dum la tuta jaro okazigas kursojn por la geinstruistaro de la lando en diversaj fakoj. La geinstruistoj esperantistaj estas invitataj partopreni la ferian semajnon je la samaj favoraj kondiĉoj kiuj valoras por la jam menciitaj kursoj. La neinstruistoj partoprenos je modestaj prezoj. Eksterlandaj geinstruistoj kaj interesuloj, bonvolu subteni la strecajn klopodojn, aranĝi tiun kurson, anoncante vin jam baldaŭ je Heinrich Müller, Hannover, Mommsenstr. 5/I

● **"Amtsblatt der Stadt Nürnberg"** de la 9a de majo 1962 enhavis longan artikolon de la Stadtbibliothek Nürnberg pri "75 jaroj de Esperanto-literaturo", kun plenaj informoj pri la diversaj stadioj de la evoluo de tiu literaturo kaj detaloj pri la plej gravaj verkistoj en Esperanto.

Grekujo

● **D-ro Anakreon Stamatiadis,** HM de UEA, instruis Esperanton dum la ĵus finiĝinta lerneja jaro al 1042 gelernantoj. Ĉe la 9a gimnazio en Ateno ni havis 427 lernantojn; ĉe la ŝtata gimnazio Nea Ionia 91 gelernantojn; ĉe ties Virina Gimnazio 232 lernantinojn; ĉe la gimnazio "Kato Petralona" 100 gelernantojn; ĉe la viraj kaj virinaj gimnazioj de Pireo 192 gelernantojn. D-ro Stamatiadis donas sian servon senpage.

Hispanujo

● **En la kadro de la Unua Renkontiĝo de Hispana Esperantista Junular-Sekcio** okazis la tria kunsido de Barcelono-provinca Esperanto-Komisiono, kies sekretario estas la aktiva UEA-Ĉefdelegito por Hispanujo, s-ro Ramon Molera. Interalie oni interkonsentis okazigi la IVan BEK-Renkontiĝon en la fama kataluna ledurbo Igualada en la fino de septembro aŭ la komenco de oktobro.

Hungarujo

● **D-ro Tadros Megali,** araba ĵurnalisto, vizitis Hungarlandon kaj faris tre sukcesan prezentadon kun kolorlumbildoj pri sia patrujo Egiptujo, en la budapeŝta klubo Konkordo kaj aliloke. Li partoprenis la fervojistan kongreson, pri kiu li sendis raportojn al egiptaj ĵurnaloj.


Italujo

● **Rotaria Klubo en Cittadella (Padova)** — Italujo — 186a Distrikto invitis D-ron Dino Fabris, prezidanton de la loka Esperantista Grupo kaj ĝeneralan sekretarion de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio prelegi pri "La Internacia Lingvo kaj Rotario". Memorigante nian neforgeseblan Prezidanton de UEA prof. ron Giorgio Canuto kiu estis samtempe eminenta rotariano, la oratoro pritraktis — interalie — la proponon kiu estos prezentita al la Rotary Kongreso en Los Angeles favore al Esperanto kiel oficiala lingvo, kaj sendis mesaĝon, en la nomo de la ĉeestantoj, al la Kongreso mem por subteni la iniciaton.

● **En Mantova** la 6an de majo okazis la 4a Mantova Esperanto-Tago.

Japanujo

● **Nova disko de "La Espero" kaj "La Tagiĝo".** Amo-Akademio (Temmori, Kozoĵi, Aiĉiken, Japanujo) eldonis la muziknotojn de "La Espero", kun kiuj oni ricevas ankaŭ gramofondis-



Okaze la Internacia Fervojista Esperanto Kongreso en Budapest 20 pionirknaboj ĉe la Pionirfervojo/Junulara fervojo, kie la deĵorlaborojn faras geknaboj/partoprenis Esperanto-kurson gviditan de prof. Alfons Pechán kaj Pál Balkányi.
La foto montras la gelernantojn, kiam s-do Balkányi rakontas al ili pri Esperanto-revuoj. Por la kongresanoj aperis foto-prospekto pri la Pionirfervojo en Esperanto.

kon (rapideco 33⅓), sur kiu la Nagoya ĥortrupo kantas la himnon kaj "La Tagiĝon". Prezo : us. dol. 0,3 kun sendkostoj.

Kanado

● **La anglalingva informnumero de "Kanada Esperanto-Revuo",** kies altan kvaliton ni menciis en pli frua "Tra la mondo", estos eldonita kiel apartan libreton de la Esperanto-Press, Oakville, Ont., Kanado, kaj estas nepre utiliginda en ĉiuj anglalingvaj landoj. Por informoj pri la prezo, oni sin turnu al la supra adreso.

Nederlando

● **La Esperanto-komitato** de ses kunlaborantaj klubetoj en Utrecht, kiuj atingis la nomigon de Zamenhof-aleo en kvartalo de tiu urbo, deziras tie starigi indan Zamenhof-monumenton, kaj petas financan helpon de Esperantistoj kaj simpatiantoj. Oni povas fari kontribuojn pere de poŝtĉekkonto No. 535066 (Utrecht Esperanto Komitato).

Pollando

● **Nova pola gazeto "Radar"** enhavas leterojn en pluraj lingvoj, t.e., en la gepatra lingvo de la skribintoj. Esperantistoj skribu (kaj abonu) al la Redakcio de Radar, 40 Smolna St., Warszaw 43, montrante la grandegajn avantaĝojn de la Internacia Lingvo. Radar en internacia eldono aperas sesfoje pojare kaj la jarabono kostas 6,30 gm (22 steloj).

Svedujo

● **La Turisttrafika socio de Höör** presigis belan, koloran prospekton pri Höör kaj Frostavallen en Esperanto. Bv. mendi ĉe Höörbygdens Turisttrafikförening, fako 101, Höör. SVEDUJO. (Unu respondkupono por sendkostoj)

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Piha. Kvara filo, Roberto, naskiĝis al Salomon M. Piha, en Aleksandrio, Egiptujo, la 26an de aprilo 1962.

Puig. La 27an de majo naskiĝis tria filo al ges-anoj Carme Cànovas kaj L. Puig en Sabadell, Hispanujo.

GEEDZIĜO

Geedziĝos la 1-an de septembro 1962 f-ino Joyce Coates kaj s-ro Gordon Hawker (kasistino kaj sekretario de Folkstona Esperanto-grupo, Britujo). Esperantajn salutojn sendu al adreso : 6 Walton Gardens, Folkestone, Kent, Anglujo.

NEKROLOGO

Gilliard. S-ro Jules Gilliard, La Neuveville, Svislando, mortis la 28an de aprilo 1962 pro aŭtomobila akcidento.

Parareda. La 1-an de aprilo mortis en Moĵá (Barcelona) je la aĝo de 56 jaroj s-ro Juan Parareda Bosch, patro de la aktiva esp-isto s-ro Francisco Parareda Franŝuesa, Sekretario de la Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio.

Perogordo. La 3an de majo mortis en Madrido generalo Jozefo Perogordo, 92-jara. Estis li kiu, komisiite de la hispana registaro, surmetis la Grandan Kolringon de "Isabel la Catolica", plej alta honoro por civilaj meritoj en Hispanujo, al D-ro Zamenhof en la Antverpena Kongreso, 1911.

Rogister. En decembro 1961 mortis en Verviers, Belgujo, Camille Rogister, 72-jara.

Sklenčka. Otto Sklenčka, elstara Ĉeĥoslovaka esperantisto, mortis en Praha la 4an de majo 1962. Li naskiĝis 2.XI.1891 kaj estis esperantisto de 1908.

Triĉkova. La 11an de majo mortis Todorka Radoslavova Triĉkova, 64-jara, edzino de R.K. Triĉkov, kaj patrino de denaskaj esperantistinoj Esperantina kaj Lilli.

Zimmermann. La 31an de marto mortis en Zürich s-ro Oskar Zimmermann, 83-jara, esperantisto de 1906.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

OFICIALA INFORMILO N-ro 348

NIEUWE BINNENWEG 176
ROTTERDAM-2 — NEDERLANDO

DELEGITOJ

Bruxelles. **Belgujo**
FD (Instruado): vakas.

Gentofte. **Danlando**
FD (Juro): vakas.

Firence. **Italujo**
FD (Religio, Filozofio): vakas.

Selce. **Jugoslavio**
D: vakas.

Mekněs. **Maroko**
D: vakas.
FD (Islamismo): vakas.

Norvegujo

Oslo. 450.000.
FD (Arĥitekturo): S-ro K. E. Norrvall, arĥitekto, Sanakerveien 67 E. I. Tel.: 21 29 65.

Sauda.
FD (Industrio): vakas.

Trondheim (Sør-Trøndelag). 60.000.
FD (Komerco): S-ro A. O. Mjøen, butikestro, Jonsvannsvn. 1, Tel.: 31500, post la 5-a horo p.m. 25502.

Nov-Zelando

Auckland (Auckland). 400.000.
FD (P.T.T. Telefonio): S-ro S. T. Perfect, ĉefteknikisto de Telefonio, Box 1126, Tel. : 21-519 (oficejo).

Portugalujo

Lisboa. 900.000.
FD (Edukado): S-ino Maria de Deus Antunes, instruistino, R. Fanqueiros, 106, 4º dtº. Tel.: 30434.

Sovetunio

Minsk (Belarusskaja SSR.). 500.000.
VD: S-ro M. P. Mandrik, inĝeniero-geodezisto, Obuvnaja 47, kv. 3, Minsk-4.

Moskva (Jugo-Zapad), 6.000.000.
VD: D-rino A. E. Pipkina, dentkuracistino, Leninskij prospekt 90, kv 121, Moskva B-313.

Svedujo

Falköping (Västergötland). 15.000.
FD (Turismo): S-ino A. Aronsson, St. Sigfridag. 6. Tel.: 12384.

Lidköping (Västergötland). 17.000.
VD: S-ro A. Johansson, metallaboristo, Hallgatan 18. Tel.: 25495

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Dorsay, S-ro Elmer, Sevilla, Hispanujo.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1962

420. Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo; 421. Grabau, F-ino M., Hamburg; 422. Klünder, S-ro W., Burgsteinfurt, Germanujo; 423. Nurra, S-ro G., Carbonia, 424. Aprosio, D-ro Inĝ. E., Torino, Italujo; 425. Guibert, S-ino, Kenitra, Maroko; 426. Nace, S-ro P.E., Hyattsvilla, 427. Solin, S-ro P., San Diego, Usono.

DONACO AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro A. A. Leenhard, Nederlando, 2,50 gld.

DONACO AL ĜENERALA KASO

S-ro E. Richter, Germanujo, 1,80 gld.

FONDAĴO ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 18.740,02 gld.
S-ro W. Jacob, Germanujo. 6,30 gld.
Entute: 18.746,32 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-jaro!

FONDAĴO PROF. CANUTO

Antaŭa stato: 259 MA, 33 MJ, 7 MJ kaj 1 J-MA
Ytongbolagens Esperantoförening, Svedujo, 5 MA, 1 MJ.
Entute: 264 MA, 34 MJ kaj 1 J-MA.

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

FONDAĴO DOMO

S-ro N. R. Smith, Britujo, 50.- gld.; D-ro V. Faigl, Ĉeĥoslovakio, 1,50 gld.; S-or J. C. Postema, Kanado, 150.- gld.; S-ro H. Bakker, 50 gld., S-ro A. Cseh, 50.- gld., Eerste Amsterdamse Esperanto-Ver., 50.- gld., Intern. Esp. Inst.,50.-gld., S-ro J. G. Isbrucker, 50.- gld., S-ino J. C. Isbrucker-Dirkse, 50.- gld., S-ro A. J. Middelkoop, 50.- gld., S-ro Ponti, 50.- gld., S-ro W. M. Smit, 20.- gld., Universala Ligo, 50.- gld., S-ro J. de Vries, 50.- gld., Nederlando; S-ro H. Olsson, Ssedujo, 69,45 gld.

Ĉiuj donacintoj de minimume 50 gld. estas enskribitaj en la "Ora Libro pri la Domo". Malavare donacu por la propra sidejo de la asocio!

POR VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21.5.1962)

S-ro V. Hollerer, Feistring bei Aflenz, 7.50 n.gld., S-ino H. Kaes, Vieno, 8.— n.gld., S-ino Rozo Marco, Graz, 15.— n.gld., S-ro Otto Müller, Klagenfurt, 7.50 n.gld., S-ro F. Primetzhofer, Aspach, 15.— n.gld., S-ro K. Ryba, Vieno, 15.— n.gld., D-ro E. Wüster, Wieselburg, 7.50 n.gld., S-ro S. Zodel, Vieno, 7.50 n.gld., ĉiuj el Aŭstrujo. S-ro O. Berteloot, Gent, 7.50 n.gld., S-ino L. Dekrom, Bruselo, 7.50 n.gld, S-ro J. Derieuw, Antwerpen, 7.50 n.gld., S-ro W. De Smet, Antwerpen, 7.50 n.gld., S-ro J. van Gulck, Antwerpen-Borgerhout, 7.50., S-ro E. Lödör, Gentbrugge, 6.75 n.gld., ĉiuj el Belgujo. F-ino G. A. Bingham, Worthing, 7.50 n.gld., S-ro T. L. C. Bluett, Truro, 10.00 n.gld., S-ro F. T. Brookman, London, 10.— n.gld., S-ro T. Fraser, Kirkcaldy, 10.— n.gld., S-ro J. Hegedus, Newcastle, 10.— n.gld., Prof. D-ro I. Lapenna, Wembley, 10.— n.gld., S-ro L. Leon, Manchester, 30.— n.gld., S-ro H. O. Mason, Godshill, 15.— n.gld., S-ro K. Mc Lennan, Exeter, 20.— n.gld., S-ro A. Prince, Letchworth, 30.— n.gld., S-ro S. Saft, Salford, 10.— n.gld., S-ro K. A. Stott, Stockport, 7.50 n.gld., S-ro A. W. Thomson, Welling, 7.50 n.gld., S-ro R. Ward, Bexleyheath, 7.50 n.gld., S-ro J. C. Wells, London, 7.50 n.gld., ĉiuj el Britujo. S-ino G. Lange, Hvidovre, 7.50 n.gld., S-ro O. C. Lange, Hvidovre, 7.50 n.gld., S-ro H. J. F. Tobiesen, Odense 12.— n.gld., S-ro B. Torbell, Kolding, 52.04 n.gld., ĉiuj el Danlando. Ges. V. Setälä, Helsinki, Finnlando, 33.50 n.gld., S-ro L. Angevin, Le Cailar, 7.50 n.gld., S-ro R. Bernard, Bois-Colombes, 20.— n.gld., S-ro A. Blondeaux, Courbevoie, 15.— n.gld. N. N., Bouvigny-Boyeffles, 15.—n.gld., S-ro Broise, Brezolles, 37.50 n.gld.. S-ro R. Buerick, Calais, 7.50 n.gld., S-ro L. Chasseriaud, Royan, 7.50 n.gld., S-ro G. M. Ciopeau, Sceaux, 7.50 n.gld., S-ino M. Colleu, Le Havre, 12.50 n.gld., S-ro E. Gaudry, Paris, 7.50 n.gld., S-ro Génaut, La Chappelle 7.50 n.gld., S-ino H. Lavallée, Le Havre-Bléville, 10.75 n.gld., F-ino G. Lemonnier, Asnieres, 75.— n.gld., S-ro R. Levin, Lyon, 37.50 n.gld., S-ro A. Lherbier, Ecommoy, 7.50 n.gld., S-ro M. Ligot, Valenciennes, 7.50 n.gld., S-ro D. Luez, Laon, 7.50 n.gld., S-ro G. Maillard, Bourg-la-Reine, 7.50 n.gld., F-ino Obalska, Luçon, 7.50 n.gld., S-ro M. Perrier, Strasbourg, 37.50 n.gld., S-ro M. Pruvost, Cosset, 7.50 n.gld., ĉiuj el Francujo.. S-ro J. Bettges, Duisburg-Meiderich, 13.50 n.gld., S-ino M. Beutke, Göttingen, 45.— n.gld., S-ro H. Böcker, Gelsenkirchen, 18.— n.gld., S-ro P. Böhmke, Wiesbaden, 10.— n.gld., S-ro R. Bohnert, Hidesheim, 16.20 n.gld., S-ro O. Bonte, Freiburg, 9.— n.gld., S-ro R. Brand, Bamberg, 9.— n.gld., S-ro R. Brinkmann, Unkel, 8.10 n.gld., S-ro A. Brückner, Offenbach, 18.— n.gld., Past. A. Burkhardt, Gechingen, 22.50 n.gld., F-ino F. Christaller, Stuttgart, 7.50 n.gld., S-ro H. Dey, Solingen, 9.— n.gld., S-ro H. Friesz, Schlitz, 18.— n.gld., S-ro M. Gründler, Bad Homburg, 9.— n.gld., S-ro A. Guthne, Arolsen, 16.20 n.gld., Inĝ. R. Haferkorn, Berchtesgaden, 9.—n.gld., S-ro H. Heiss, Oberkirch, 9.— n.gld., S-ro H. Henrich, Hanau, 9.—n.gld., S-ro F. Hölzgen, Weeg, 18.— n.gld., S-ro G. Johannes, Düsseldorf-Grafenberg, 9.— n.gld., S-ro M. Kilian, Altenritte, 9.—n.gld., S-ro G. Kirsch, Bad Godesberg, 10.80 n.gld., S-ro R. Klisch, Dingelsdorf, 18.— n.gld., S-ro W. Knauss, Neu-Ulm, 9.— n.gld., S-ro F. Knobloch, Münchberg, 9.—n.gld., D-ro H. Künzel, Bad Herzfeld, 7.50 n.gld., S-ro K. L. Leitl, Fürstenfeldbruck, 9.— n.gld., S-ro W. von der Ley, Tailfingen, 18.— n.gld., S-ro H. Matthesz, Darmstadt, 7.65 n.gld.,F-ino F. Michalik, Hösel, 10.— n.gld, S-ro M. Murath, Karlsruhe, 90.— n.gld., S-ro O. Peine, Dortmund, 9.— n.gld., S-ro L. Pickel, Nürnberg, 9.— n.gld., S-ro G. Podlinski, Gronau, 7.50 n.gld., S-ro H. Radermacher, Recklinghausen, 9.— n.gld., S-ro H. Rausch, Köln, 9.— n.gld., Prof. D-ro Reinelt, Bonn, 13.50 n.gld., F-ino M. Renne, Berlin-Zehlendorf, 9.— n.gld., F-ino Rosenstengel, Nordhorn, 9.— n.gld,S-ro H. Siffrin, Stolberg, 9.— n.gld., F-ino E. Stox, Berlin-Charlottenburg, 9.— n.gld., S-ro G. Wagner, Markgröningen, 9.— n.gld., S-ro R. J. Weber, Köln, 9.— n.gld., S-ro W. Wurl, Berlin-Friedenau 9.— n.gld., ĉiuj el Germanujo. S-ro E. Maynar, Zaragoza, 8.— n.gld., S-ro L. A. Ramírez, Huete, 12.— n.gld., S-ro M. R. Maza, Madrid, 4.— n.gld., ĉiuj el Hispanujo.

S-ro I. Lamont, Belfast, Irlando, 10.— n.gld. S-ro C. Daglio, Alessandria, 10.— n.gld., S-ro P. Giacinto Jacobitti, Roma, 8.— n.gld., S-ro A. Rossino, La Spezia, 11.— n.gld., S-ro A. Signore, Roma, 8.—n.gld., ĉiuj el Italujo. S-ro L. Vannini, Monaco, 15.— n.gld., F-ino L. Adelaar, Amsterdam, 7.50 n.gld., S-ro P. A. Boelsma, Haarlem, 10.— n.gld., S-ro J. Boer, Appingedam, 25.— n.gld., S-ro J. Bosschaart, Breda, 10.— n.gld., F-ino C. M. Burger, Zeist, 100.— n,gld., S-ro P. van Delden, Deventer, 10.— n.gld., F-ino D. H. van Dieren, Winkel, 7.50 n.gld., S-ro J. P. van Dijk, Oosterland, 10.— n.gld., S-ino I. M. J. Dijkhoff-Lenze, Den Haag, 7.50 n.gld., S-ro M. C. van Dordrecht, Breda, 7.50 n,gld., S-ro S. P. Duin, Haarlem, 7.50 n.gld., S-ro J. G. Duyvetter, Bennekom, 7.50 n.gld., S-ino M. Evenhuis-Nueboer, Bergen, 7.50 n.gld., F-ino J. Flach, Rotterdam, 15.— n.gld., S-ino Chr. Fransen-Hitzler, Valkenswaard, 10.— n.gld., S-ro H. Groendijk, Arnhem, 10.— n.gld., S-ro P. van Heyst, Velsen, 8.— n.gld., S-ino G. v. d. Hoeven-Fockema Andreae, Zundert 25.— n.gld., S-ro J. V. Holleman, Groningen, 10.— n.gld., S-ro S. S. de Jong, Tjerkeĉerd, 7.50 n.gld., S-ro G. Kalkman, Vlaardingen, 10.— n.gld., S-ro J. L. Th. Kamman, Amsterdam, 15.— n.gld., S-ro T. S. Kho, Voorburg, 10.— n.gld., S-ro G. H. Koudijs, Utrecht, 10.—n.gld., S-ino N. Koudijs-Modoo, Utrecht, 10.— n.gld., S-ro J. Th. Kummer, Leeuwarden, 10.— n.gld., F-ino A. Laverman, Leeuwarden, 25.— n.gld., S-ro A. A. Leenhard, Bussum, 10.— n.gld., F-ino J. Le Rütte, Groningen, 7.50 n.gld., F-ino E. M. Maasbommel, Rotterdam, 10.— n.gld., F-ino W. v. d. Meer, Zeist, 7.50 n.gld., S-ro W. H. Mook, Groningen, 10.— n.gld, Inĝ. J. F. Mouthaan, Rotterdam, 10.— n.gld., F-ino R. Neerincx, Arnhem, 10.— n.gld., S-ro C. Nelson, Dordrecht, 10.— n.gld., F-ino E. S. Otto, Den Haag 10.— n.gld., S-ro A. Pluut, Haarlem, 7.50 n.gld., S-ro Tj. Postma, Rotterdam, 25.— n.gld., S-ro C. Pot, Slikkerveer, 50.—n.gld., F-ino J. E . Prins, Groningen, 10.— n.gld., F-ino T. M. de Quaasteniet, Alkmaar, 10.— n.gld., S-ro K. Ruig, Amsterdam, 10.— n.gld., S-ro P. H. Snoek, Groningen, 10.—n.gld., S-ro G. Stedehouder, Heerenveen, 10.— n.gld., S-ro C. van der Vlies, Rotterdam, 10.— n.gld., S-ro A. H. E. van Vliet, Alphen a/d Rijn, 25.— n.gld., S-ro J. de Vries, Leeuwarden, 7.50 n.gld., S-ro A. W. van der Waal, Amsterdam, 10.— n.gld., S-ro F. Weeke, Deventer, 8.— n.gld., S-ro E. L. M. Wensing, Eindhoven, 25.— n.gld., S-ro L. J. Wulfers, Nijmegen, 7.50 n.gld., S-ino G. H. M. Wulffers-Meddens, Nijmegen, 7.50 n.gld., S-ro A. Zandstra, Haarlem, 10.— n.gld., F-ino C. Zorgdrager, Domburg, 50.— n.gld., ĉiuj el Nederlando.

S-ro J. Moe, Jar, 10.— n.gld.

S-ro T. Raimar, Nordbynes, 25.— n.gld., S-ro N. Utne, Trondheim, 7.50 n.gld., ĉiuj el Norvegujo. S-ro P. Sena, Aveira, 15.— n.gld., Portugalujo. S-ro B. Äkerberg, Stockholm, 11.— n.gld., S-ro L. Andersson, Smedjebacken, 8.— n.gld., S-ro K. Bengtsson, Krylbo, 7.50 n gld., S-ro A. Blomberg, Lidköping, 7.50 n.gld., F_ino M. Carlsson, Rimbo, 14.— n.gld., S-ro Y. Cederholm, Malmö, 7.— n.gld., S-ro K. Elofsson, Leksand, 11.— n.gld., S-ro N. Gustafson, Hällabrottet, 18.— n.gld., S-ro O. Juhlin, Hamburgsund, 10 — n.gld., S-ro S. Kaszai, Sundbyberg, 11.— n.gld., S-ro T. Lindberg, Präss-ebo, 18.— n.gld., S-ro S. Möllestad, Kramfors, 7.30 n.gld., S-ino K. Olsson, Ystad, 10.— n.gld., S-ro N. Olsson, Höör, 11.— n gld., S-ro R. Palmgren, Vallingby, 13.94 n.gld., S-ino I. de Regézy-Dahlberg, Stockholm, 7.50 n.gld., S-ro G. Rugland, Stockholm, 10.— n.gld., F-ino H. Sjöberg, Gnosjö, 18.— n.gld.,S-ro R. Stridell, Sandarne, 8.— n.gld., F_ino K. Waldén, Ystad, 70 —

n.gld. ĉiuj el Svedujo. S-ro F. Bierhoff, Döttingen, 10.— n.gld., S-ro P. Bouvier, Genève, 8.40 n.gld., F-ino L. Grütter, Samedan, 8.40 n.gld., S-ro M. Jaccard, Zürich, 7.50 n.gld , S-ro E. Keller, Winterthur, 7.50 n.gld., S-ro W. Laederach, Zürich, 12.60 n.gld., S-ro P. Métivier, Bern, 7.50 n.gld., S-ro W. Voirol, Biel-Bienne, 8.40 n.gld., ĉiuj en Svislando.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas
Direktorino c.o.

ANONCETOJ

ĈE-metoda instruist(in)o serĉata ! Per konstanta, jam ok monatojn kuranta agitado kaj informado pri Esperanto (gazetartikoloj sennombraj — flugfolioj diversaj, sennombraj — afiŝado forta — tri daŭrantaj kursetoj) la klimato por pli grandstila Esperanto-instruisto aŭ instruistino, kiu tage en la profesiaj kaj pli-altaj lernejoj kaj vespere en la popolaj altlernejoj de ambaŭ internajbaraj urboj instruu Esperanton, estas urĝe serĉata. Pedagogia diplomo apud la Esperanto-diplomo estus avantaĝa. En Mönchengladbach kaj Rheydt cetere estas ankaŭ multaj aliaj mongajnebloj por la kazo, ke ne sufiĉas la Esperanto-instruado. Cetere la varbado por kursoj estos efike subtenata per la ĉi tiea "Esperanto-Klub-Verdano" kaj la "Esperanto-Servo-Mönchengladbach".
La urboparo situas en bela ĉirkaŭo. Ĉi tie nur teksaĵ — kaj metalkonstrufirmaoj. Estas planate, aranĝi ĉi tie ankaŭ Esperanto-kulturcentron por tuta Bas-Rejnlando. Interesatoj aŭ diplomontoj bonvolu kontakti la UEA-delegiton H. Dito Goeres, "Esperanto-Servo-Mönchengladbach", Viersener-Str. 255, Germanio okcidenta.

Korespondas sonbende sperta E-isto J. Foster, 2 St. John's Ave., Kirkby in Ashfield, Nottingham, Anglujo.

Ek de la 25-a de julio 1962 Norman R. Smith ne plu havos adreson en Eŭropo.

D-Soleo, pro malsaneto kaj senlaboreco, devos kelkajn monatojn silenti.

Esperanto-Parolata 1962, vendas Libroservoj kaj Eldoninto: M. Rétot, 162 A. Briand Montreuil (Seine), Francujo. 4 respondkuponoj - 5 steloj - 1,80 NF (afrankite): poŝtkonto Paris 1042-07.

Turismajn Informojn kaj bildprospektojn vi petu de franca arturbo. Skr. "Syndicat Initiatives", Rouen Seine-Maritime, Francujo.

Por montri al siaj gekamaradoj la disvastiĝon de Esperanto, 14-jara liceano deziras ricevi I.P.K. de geknaboj el la tuta mondo. Nepre resendos I.P.K. Claude Trésorier, 2, rue des Lilas - Besançon (Doubs) - Francujo.

Esperantistoj! Vizitu la familion Trésorier inter la 16-a de Julio kaj la 15-a de aŭgusto en ĝia libertempa hejmo: 104 rue Montauban - Les Sables d'Olonne (Vendée), kaj dum la tuta jaro, 2, rue des Lilas - Besançon (Doubs) Francujo.

Arĝenta Spesmilo 1912 serĉata. Proponojn kun indiko de postulata prezo peras Ota Ginz, Ŝikun Agaŝ 30/8, Kirjat Jam Bet, Israelo.

Zbigniew Byrka, Recz-Pomorski, Choszczno-Szczecin, Pollando - korespondos kun gejunuloj.

Kuraĝon vivadi? Sencon en la ekzistado? Sekura malgraŭ ĉio? La respondon prezentas la plej vendata libro de la mondo, la Biblio. La Prepara Bibliostudado de la Navigantoj, kiun vi ricevos senpage, sendinte nomon kaj adreson, helpos al vi trovi la respondon de la Biblio pri gravegaj demandoj. Skribu hodiaŭ al Navigatörerna, Örebro, Svedujo.

Kanado: 200 pacamantinoj, membroj de "Voĉo de Virinoj", nun lernas Esperanton por korespondi kun vi. Skribu aĝon, profesion kaj interesojn al Vilma Eichholz, Esperanto, Oakville, Ontario.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Malongigoj : I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 249m. (1205 kcs), 42.11m., 41.18m., 31.50m., 31.45m., 31.01m., 25.42m., 25.28m. P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m., 39.11m. **P. Radio Sofia, Bulgarujo.**
	23.30-23.55	Sofia, 41.35m., 25.32m. P.
	23.40-24.00	Bilbao, **265m. (1133 kcs). P. Radio Bilbao, Hispanujo.**
	23.45-24.00	Rio de Janeiro, 441m. (680 kcs), 60.30m. K.I. Radio Copacabana ZYP 20/27, Avenida Rio Branco 227-17, Rio de Janeiro, Brazilo.
Lundo	12.20-12.30	Bern, 48.66m., 31.46m., P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwellendienst, Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	17.00-17.15	Valencia, 278m. (1079 kes). P. La Voz de Levante, Valencia, **Hispanujo.**
	22.40-22.55	**Hilversum, 402m. (746 kcs). P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).**
Mardo	17.55-18.10	Roma. **50.34m., 41.24m., 30.90m. P. Radio Roma, Casella** Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang. 360m. (820 kes), 286m. (1050 kes), 278m. (1080 kes), 48m. I.P. Centra Radio Komitato, Pjongjang, Norda Korzo.
	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. **Kiel marde.**
	23.00-23.15	Guatemala, 469m. (640 kcs), 48.54m., 30.72m. I.K. Radio Nacional T.G.W., Guatemala Cd, **Mezameriko.**
Jaŭdo	06.00-06.15	Gdansk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul. Uphagena 1, Gdansk-Wrzeszcz, Pollando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs, 242 m. (1241 kes), 222m. (1349), K. Esperanto Office, Orleans (Loiret), Francujo.
	17.50-17.55	Praha. 233m. (1286 kes). P. Radio Praha, Sendung für Osterreich, Ĉeĥoslovakujo. (nur la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato).
	21.15-21.25	Bern, 48.66m., 31.46m., 25.61m., 19.60m. **P. (D-ro Baur).**
	22.05-22.20	Zagreb, 264m. **(1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.**
Vendredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10	Hilversum 298m. **(1007 kcs). V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.**
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 25.10m., K.I. Radio Ministério da Educação, Praç da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaude. (D-ro Privat).
	22.00-22.30	**Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto** Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.

Radio Roma. 3-VII, Tra la literaturo; 6-VII, La kvar sezonoj : Somero; 10-VII, Novaĵoj el Italujo; 13-VII, F.A.O. (Nutra kaj agrikultura organizo); 17-VII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 20-VII, G. Marconi, okaze de la 25-a jarreveno de la morto; 24-VII, Leterkesto : 27-VII, Insulo Sardinio; 31-VII, La fontoj de Blitumno. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

ELEKTO KOMITATANOJ B

Ĵus okazis la voĉdonado pri komitatanoj B por la venonta laborperiodo (vidu febr. no. "Esperanto" 1962, p. 34). La limdato por sendi la voĉdoniloj estis la 31-a de majo 1962. Estis proponitaj 8 kandidatoj por 6 liberaj lokoj. La elektoj okazis laŭ la preskriboj en art. 28 de la Ĝenerala Regularo de U.E.A. (vidu p. 157 de Jarlibro 1959, Unua Parto).

Voĉdonis entute 726 delegitoj. La tutmonda delegitaro elektis per la parenteze indikitaj nombroj da voĉoj la jenajn personojn : D-ron A. Albault (575), Mag. W. Auld (629), Prof. D-ron I. Lapenna (684), Doc. J. Régulo Pérez (541), S-ron K. Söderberg (563) kaj S-ron C. Støp-Bowitz (562). Ĉiuj elektitoj estis komitatanoj B ankaŭ en la pasinta laborperiodo.

La komisiono por kalkulado de la voĉoj konsistis el la jenaj personoj, ĉiuj dumvivaj membroj de U.E.A. : F-ino E. M. Maasbommel, F-ino J. M. v. d. Hengel, S-ro J. Th. de Goeij kaj F-ino M. H. Vermaas, direktorino de la C.O. Per sia subskribo ili konfirmis la korektecon de la supremenciita rezulto de voĉdono.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

SENDU VIAN MORALAN ALIĜON AL LA UNIVERSALA KONGRESO EN KOPENHAGO !

LA C.O. KAJ LA L.K.K. VOLONTE AKCEPTOS VIAN KOTIZON JE 15.— n.gld. AŬ 30.— d.kr. VI RICEVOS LA KONGRESAN LIBRON KAJ ALIAJN DOKUMENTOJN !

TENERIFE

Ĉu vi ŝatus posedi dometon sur la rava insulo en Atlantiko ?

Ni konstruos laŭ via gusto ! Internacia atmosfero ! Ĉiama printempo !

Nenia hejtproblemo ! Nenia atomtimo !

Belegaj terenpecoj kun panorama rigardo, en Puerto, disponeblaj.

Petu informojn de **N-ro 200, gazeto ESPERANTO,** Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, NEDERLANDO

PACAMANTOJ !

Memoru antaŭmendi la periodaĵon "NOVA MONDO", samtempe sendante 2 : — sv. kr. aŭ egalvaloron por la kostoj. — Estas tre grave ke ĝi aperu ! Unika kaj Gravega artikolaro jam anoncita ! — Cetere vidu la anoncon en la aprila numero de "Esperanto".

Adr.: Gunnar Rugland, ĉe Rönnell, Hornsgatan 89II, Stockholm Sv., Svedujo.

Oni ankaŭ povas mendi la periodaĵon, kaj ni poste enkasigos la monon.

NATURISTA ESPERANTO-REVUO ILUSTRITA

nun akirebla, dumvive aŭ jare !

La bele ilustrita revuo "Naturista Vivo" sendiĝas senpage al membroj de INFE (Internacia Naturista Fakgrupo Esperantista). **INFE nun fariĝis la oficiala Esperantista Labor-Grupo en INF/FNI,** la monda organizaĵo multfoje pli granda ol la tuta Esp.-movado.

Membreco en INFE (inkl. "Naturista Vivo") kostas DUMVIVE nur 100 Stelojn, por familio aŭ sola viro; 50 Stelojn por sola virino.
Por nur UNU-JARA membreco kostas 20 Stelojn. Egalvaloraj monbiletoj (100 Steloj = $ 7.50) de iu ajn lando, aŭ poŝtmandato, ĉeko, k.a. estas same akceptataj.

Ekde 1963 la kotizo plialtiĝos, tial :

ŜPARU MONON—ALIĜU TUJ ! ! !

INFE-sekretario/kasisto Leif Heilberg, 1801 Page St., San Francisco 17, Calif., USONO.

Nova Espero !

Nova Vivo ! Nova Kulturo !

PACO SUR LA TERO !

Fondi idealistajn societojn, ekonomiajn kolektivojn, ĉie en la mondo, kie estas eble, estast la celo de starigĝanta nova organizaĵo. Per praktikado de la Pacfaktoraro en tiaj societoj oni montru ekzemplojn pri la vojo al

PACO SUR LA TERO

pere de UNIVERSALA AMO, kiu rezultigos la celon, samtempe rimedon :

REEN AL LA NATURO !

Tiuj ekzemploj kontribuu al la spirita kresko kaj progreso de aliaj individuoj por ke ili alkresku al la paciga faktoraro, ĉar

ESTAS LA SPIRITO KIU VIVIGAS !

Interesiĝantoj sin turnu por pluaj sciiĝoj al
Gunnar Rugland
ĉe Rönnell, Hornsgatan 89 II
Stockholm Sv., Svedujo
samtempe sendantaj, se eble, 2 respondkuponojn aŭ egalvaloron por la kostoj.

Moderna lernolibro de Esperanto

por la tuta mondo

Vilho Setälä :

Privilegia Vojo

al lingvoscio : **Esperanto**

Kun instrukcioj en multaj naciaj lingvoj

Prezo 10 steloj + sendkosto

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj Svedujo: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj

aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad Nice (A.M)

Konatiĝu kun

BELARTO

LITERATURO

ARTO

KULTURO

Prezo : 3,— gld. (12 steloj) por membroj
3,50 gld. (14 steloj) por nemembroj
68 p. Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Esperantistoj, kiuj vizitas

MONTECATINI TERME-n

(apud Pistoia, Italujo) dum la termala sezono (majo - oktobro) povas peti informojn, esperante, ĉe la gegastoj-klubo (Circolo forestieri - Terme Tamerici).

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

Monumento al la aŭtoro de la Internacia Lingvo

Riĉa fotomaterialo

Elegante bindita en bonkvalita tolo kun stampo en oro

Prezo : 12,50 gld.
50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

Eldonis C.E.D. Mendu ĉe U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176 — Rotterdam

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdamo